



ESPERANTO
DECEMBRO 1960

53 a Jaro — N-ro 661 (12)

esperanto

DECEMBRO 1960

53a JARO

REVUO INTERNACIA

N-RO 661 (12)

Fondinto : H. HODLER

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro :
W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannan-
shire), Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2,
Nederlando. Telefono : (010) 128313. Ĝirkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive
la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon
al nia redakcio.

Jara abono (1961) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro
15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld,
1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj.

Teksto de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la
respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezi-
danto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi,
Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47,
Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South
Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca
3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro : ĉe Mag. Bruno Keppeler, Place Longemalle
16, Genève, Svislando (provizora adreso).

LA FRONTPAĜA BILDO :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, Prezidanto de U.E.A.,
Doktoro pri Medicino kaj Kirurgio, Doktoro pri
Juro, Granda Oficiro de la Ordeno pro la Merito
de la Itala Respubliko, Ordinara Profesoro de
Jurmedicino en la Universitato de Torino †

Enhavo

Forpasis la Prezidanto, I. Lapenna . . .	201
La personeco kaj lastaj momentoj de Prof. D-ro G. Canuto, L. Minnaja . . .	202
Memoriga fondaĵo Prof. G. Canuto . . .	205
Danko pro la kondolencoj	205
Aganta Prezidanto	206
Unuaj kontribuoj Fondaĵo-Prof. Canuto . . .	206
Dankesprimo de la Redaktoro	206
Nia "Tago de la Libro", W. Auld	206
Priesperanta informado en Italujo, R. Pennazio	207
Poŝtistoj, telekomunistoj ! (Alvoko) . . .	209
Cirklo ĉirkaŭ la mondo	209
Postkongreso de la 45-a	211
Oldenburgo atentigas	211
Norvega Somera Semajno	211
Nederlando	213
Danlando	213
Gejunuloj - Geskoltoj	214
D-ro Ferenc Szilagyí 65-jara	215
La Komisio, A. Samijn	217

Rubrikoj :

CED	210
Tra la mondo	212
Esperantista vivo	213
Radio	213
La Juna Vivo	214
46-a Universala Kongreso	215
La Internaciaj Konkursoj 1960	215
Novaj Libroj	216
Oficiala Informilo	219

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la
redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare
tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur
unu flanko de la papero (prefere en normformato
A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno
maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto.
Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn super-
signojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn
manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko
aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

Forpasis la Prezidanto

La ŝoke trista sciigo disvastiĝis fulmorapide: Prof. D-ro Giorgio Canuto ne plu estas inter ni.

Lia varma koro — tiu fajrujo disradiana flamon de senfina amo por la Homo — subite haltis. Lia nobla menso — tiu nesto de potencaj sciencaj ideoj kaj kuraĝaj pensoj — ĉesis funkcii. Lia kara, ĉarmega vizaĝo — tiu spegulo de internaj ĝentileco, bonkoreco kaj vivoĝojo — adiaŭis nin por ĉiam. Giorgio Canuto, la modela edzo kaj patro, la respektata sciencisto, la amata kolego kaj amiko, la alteŝatata integra esperantisto, forpasis. Li estis en la aŭtuna mezo de sia vivo kaj la sorto — ĉu simbole? — forrabis lin de ni en sabata tagmezo de aŭtuno, kiam la naturo ja regalias per maturaj fruktoj, sed kiam ankaŭ glaciaj ventoj nudigas la arbojn kaj anoncas la vintrajn frostojn.

La malapero de Prof. D-ro Giorgio Canuto signifas ne nur pli ol dolorigan perdon por lia familio kaj por la plej intimaj geamikoj, sed ankaŭ fortengan baton por la jurmedicina scienco kaj ankoraŭ pli grandan por la tuta Esperanto-Movado.

Jam kiel junulo Giorgio Canuto akiris du doktorecojn: la medicinan kaj la juran. Baldaŭ li kunligis la sciojn de la du sciencaj branĉoj por fariĝis iom post iom unu el la plej grandaj sciencistoj ne nur de Italujo, sed de la tuta mondo pri jurmedicino. Kiam la fama Prof. Carrara forlasis la katedron, la duobla doktoro fariĝis profesoro de jurmedicino en la Universitato de sia naskiĝurbo Torino, kiun li tiel profunde amis kaj kiun li kun granda fiero montradis al mi la pasintan septembron. Poste li estis alvokita instrui en la Universitato de Perugia, sed ankaŭ tiu de Parma volis lin havi. En tiu lasta Prof. Canuto plenumis dum 6 jaroj la funkcion de *Rector Magnificus*. En 1956 — la saman jaron kiam li fariĝis Prezidanto de UEA — la Universitato de Torino unuanime invitis lin repreni la katedron en tiu Universitato kaj samtempe fariĝi Direktoro de la Mondfama Instituto de Jura Medicino, la sama, kiun fondis la glora Cesare Lombroso. La sciencaj verkoj de Prof. Canuto estas konataj vaste ekster la limoj de lia patrujo, dum laŭ lia ampleksa kaj profunda lernolibro miloj da studentoj lernis la bazojn de tiu grava scienca branĉo. Krome, Prof. Canuto, kiel la plej granda specialisto en tiu fako, estis vokita doni sian sciencon opinion en la plej grandaj procesoj, raportitaj en la gazetaro de la tuta mondo, ekzemple en la kazo Grande kaj en la ankoraŭ pli konata Montesi. Kiel alte estis apreciata la scienca kaj eduka laboro de Prof. Canuto, montras la fakto, ke li estis distingita per la tre alta ordeno de Granda Oficiro de la Itala Respubliko. Iom poste li ricevis la Oran Medalon pro meritoj en instruado, kulturo kaj arto. Tiu lasta

estas la plej alta distingo, kiun en Italujo povas ricevi persono laboranta sur la kampo de scienco, kulturo kaj edukado. Ĝin ricevas nur la plej meritaj sciencistoj-profesoroj, kutime plurajn jarojn post la emeritiĝo. Prof. Canuto ricevis ĝin dum plena aktivado en la Universitato!

Kiel 28-jara junulo Giorgio Canuto eksciis pri Esperanto kaj ellernis ĝin. La juna sciencisto rilatis al la Internacia Lingvo kun la samaj amo kaj rigora precizeco, kiel al la du sciencaj branĉoj de sia profesio. Kaj malgraŭ la multflankaj esploraj, teoriaj kaj praktikaj laboroj sur la scienca kampo, li tamen ekde tiam trovis ĉiam sufiĉe da tempo por plenumi plej konsciencoj kaj plej sindone la diversajn funkciojn kaj taskojn en la Esperanto-Movado. Tiuj certe ne estis malmultaj. Prof. Canuto estis aktiva en ĉiuj grupoj de la urboj kie li oficis, gvidis kursojn por studentoj en la universitatoj, estis membro de la Akademio de Esperanto, dum multaj jaroj prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio kaj samtempe komitatano de UEA, aktiva kunlaboranto de CED ekde ĝia fondiĝo en 1952. Al ĉiuj ĉi funkcioj aldoniĝis en 1956 la respondeca devo de Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. Tiun gravegan funkcion — kiel, cetere, ĉiujn aliajn — Prof. Canuto plenumis kun granda lerteco, senfina sindediĉo, elstara takto kaj multe da pacienco. Kiom da fojoj lia klara juĝo solvis malfacilajn problemojn! Kaj kiom da fojoj lia milda personeco kaj afabla rideto trankviligis la pasiojn! Eĉ la malsano, kiu precipe en la lastaj monatoj plurfoje inside atakis lin, ne povis malgrandigi lian laboron en la Asocio kaj ĝenerale en la Movado. En Bruselo li ne ĉeestis, sed plurfoje dum la kongreso li telefone interesiĝis pri la evoluo de la laboro kaj donis siajn konsilojn. Liaj ĝentileco kaj afableco estis pli ol kortuŝaj, kaj lia iom dolĉa prononco de la Internacia Lingvo estis aminda eble precize tial, ĉar ĝi harmoniis kun lia humaneco. Kiam Prof. Canuto prelegis en Internacia Somera Universitato, la salono estis ĉiam plenplena, ĉar li sciis prezenti eĉ la plej malfacilan temon en maniero simpla, komprenebla kaj alloga. Liaj prelegoj estis saturitaj de humanismaj sentoj kaj pensoj.

Tia estis Prof. D-ro Giorgio Canuto — imitinda modelo de sciencisto, esperantisto kaj, ĉefe, homo. Mi estas certa, ke la informo pri lia forpaso malsekigis multajn okulojn. Mi ne hontas diri: ankaŭ la miajn. Sed ni forviŝu la larmojn, streĉu niajn fortojn kaj, sekvante la ekzemplon de Giorgio Canuto, laboru ankoraŭ pli firme kaj sindone por la progresigo de la Internacia Lingvo. Tiele ni esprimos la plej belan omaĝon al la memoro de tiu homo, kiun ni ĉiuj tiel profunde estimis kaj amis.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

La personeco kaj lastaj momentoj de Prof. D-ro G. Canuto

Sabaton, la 29-an de oktobro, je la 13-a horo, en la aĝo de 63 jaroj, prof. Canuto estingiĝis pro subita koratako en sia hejmo en Torino.

Jam de longe li ne ĝuis plenan sanon, kaj li estus devinta preni kelkajn periodojn de komplete ripozo kaj neniam tro streĉi siajn fortojn per laboro tro intensa; sed, malgraŭ la konsiloj de la kuracistoj kaj de la gefamilianoj, li tre ofte preteratentis la postulojn de siaj fizikaj kondiĉoj puŝita de la entuziasmo al la plej noblaj idealoj.

Ni memoras lin en la fervoro de la kongresaj manifestacioj en Varsovio: jam tiam ni rimarkis kelkfoje lian spiron peze malfacilan, sed li senhalte kaj senŝpare partoprenis en ĉiuj eroj de la programo, donante al ili gravecon per sia ĉeesto kaj per sia varma parolo: ĉe la Inaŭguro, en la kontakto kun la diversaj lokaj aŭtoritatoj, per prelego ĉe Somera Universitato, en la diversaj ceremonioj honore al Zamenhof, en la meto de la unua ŝtono por la starigota monumento en Bjalistoko. Estis tiu la lasta Universala Kongreso, kiun li partoprenis, kaj bonŝance ĝi estis ne nur jubilea pro la centa datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, sed ankaŭ la plej impona postmilita. La partoprenon en la solena decembra manifestacio en Kopenhago, honore al D-ro Zamenhof, lastmomente li devis rezigni pro malsano. Post plurmonata intensa laboro por la universitato kaj por nia movado, li estus dezirinta partopreni, kiel kutime, en la Universala Kongreso en Bruselo; sed ankaŭ tiam, ĝuste kelkajn tagojn antaŭ la komenco, nova malsano devigis lin kuŝi en la lito, kaj tiel en la 45-a Kongreso mankis (kiel diris la vic-Prezidanto mem en sia inaŭgura parolado) lia "korvarmiga elokventeco". En la postaj monatoj liaj kondiĉoj pliboniĝis, kaj ni revidis lin en la jubilea Itala Kongreso en Cortina d'Ampezzo, kontenta pro la brila sukceso kaj plena de entuziasmo por la estonta laboro jam planita; sed ankaŭ tiam li verŝajne tro ekspluatis siajn fortojn. Revene de Cortina, la 17-an de septembro, ni vojaĝis en vagonaro kun li ĝis Padovo, kaj en tiu stacidomo ni disiĝis je la 14-a kaj duono kun "ĝis revido en Romo en novembro". Kontraŭe tiu estis nia lasta renkontiĝo: por li novembro ne venis! La nokton inter la 29-a kaj la 30-a de oktobro atingis nin urĝa telegramo kun la neatendita funebra sciigo. Matene, la ĵurnaloj portis detalojn pri la subita forpaso de la eminenta sciencisto.

D-ro Canuto, ordinara prof. pri Jura Medicino ĉe la Universitato de Torino, mortis la 29-an de oktobro pro kora infarkto. Jam la antaŭan tagon, vendredon, li sentis sin malsaneta dum li prezidis ekzamenan komisionon, sed tio baldaŭ forpasis

kaj li restis ĉe la universitata Instituto ĝis vespere. Sabaton matene li restis hejme por ripozi; la kolapso trafis lin dum li estis alproksimiĝanta al la tablo por la tagmanĝo. La familio tuj alvokis la kuraciston, kiu senprokraste kuris al li; sed, kiam li alvenis, prof. Canuto estis jam mortinta. Baldaŭ lia hejmo estis celloko de multnombraj vizitoj de amikoj (esperantistoj, profesoroj, kunlaborantoj kaj studentoj) kaj de amaso da kondolencaj telegramoj.

En Romo la funebra informo disvastiĝis rapide dimanĉon matene tra la esperantistaro, kaj, post la kutima meso por la esperantistoj, pastro Jacobitti, per noblaj vortoj, memorigis la karan forpasinton, kaj la tuta ĉeestantaro diris specialan preĝon por li.

Naskiĝinta en Torino la 3-an de junio 1897-a, prof. Canuto apartenis al familio, en kiu la kuracista profesio estis tradicia: lia patro estis lertega klinikisto; lia patrino estis la unua virino, kiu doktoriĝis pri medicino ĉe la Universitato de Torino. Doktoriĝinte pri medicino en 1920-a kaj poste pri juro en 1924-a, prof. Canuto frekventis la Instituton pri Jura Medicino kaj, sub la gvido de la fama profesoro Mario Carrara, li baldaŭ firmiĝis



Prof. Canuto, kiel Rektoro de la Universitato de Parma, en ceremoniaj vestoj dum solenaĵo.

kiel asistanto, kaj poste, kiam Carrara devis forlasi la katedron, li estis nomita komisiito pri la instruado de Jura Medicino en Torino. Kelkajn jarojn poste, li estis vokita kiel ordinara profesoro al la Universitato de Perugia kaj en 1938-a al tiu de Parma, kie dum ses jaroj li estis ankaŭ Rektoro. En 1956-a li fine atingis la definitivan katedron en sia naskiĝurbo. Tre riĉa estis lia scienca aktiveco kaj abunda lia produktado (ion li verkis rekte ankaŭ en Esperanto), kaj li donis sian valoran kunlaboradon al la monumenta itala traktato pri Jurmedicino. Kiel ekspertizisto kun skrupula animo kaj scienca rigoro li plenumis malfacilajn taskojn en la plej komplikaj procesoj.

Sed, se rimarkindan famon li akiris en la profesia scienca kampo, ne malpli da kontenteco li ĝuis en flanka interesiĝo, kiu ludis en lia vivo duan ĉefan rolon. Iun tagon, je la fino de 1924-a, la blinda hazardo kondukis profesoron Canuto antaŭ strat-afiŝon pri Esperanto: tiu fajrero ekbruligis la grandan flamon, kiu poste ĉiam ardis en lia nobla koro. Li tuj perceptis la altan idealan valoron de Esperanto, kaj, ĉar li estis persono, kiu sin dediĉas serioze al tio, kion li trovas interesa, li tuj ellernis la lingvon internacian, kaj vigle eniris en la movadon kun granda entuziasmo, profunde konvinkita, ke nur per facila interkomprenilo la homoj povos sin reciproke koni kaj ami. Kaj, konsiderante ĉi tiun celon kiel la plej gravan por kontentigi la noblajn sentojn de sia animo, li baldaŭ komencis gvidi Esperanto-kursojn kaj post ne longe li akceptis la prezidantecon de la Grupo de Torino. En 1928-a li estis elektita vic-Prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio, kaj la postan jaron li gvidis kurson ĉe Radio-Torino, metante en ĝin sian tutan animon.

En 1932-a ankaŭ U.E.A. petis lin doni al ĝi la

helpon, kiu povas veni ĉu de lia senlaca aktiveco ĉu de lia granda prestiĝo en la scienca kampo; kaj li bonvole aldonis al sia jam laborplena tago la laboron kiel membro de la Reorganiza Komitato de U.E.A.

Post la dua mondmilito, pli forta, pli fervora ol antaŭe, li akceptis la Prezidantecon de la Itala Esperanto-Federacio kaj la oficon de Komitatano de U.E.A., en kiuj pli kaj pli li montris siajn elstarajn kvalitojn. Ek de tiam, al nia movado li dediĉis tage kaj nokte ĉiujn horojn, kiujn lasis al li liberaj lia scienca aktiveco. Lia multflanka agado manifestiĝis ankaŭ ĉe la Somera Universitato, kie preskaŭ ĉiujare li faris klerajn prelegojn precipe pri jurmedicinaj temoj.

En 1956-a, dum la Universala Kongreso en Kopenhago, li estis elektita Prezidanto de U.E.A. En tiu ofico eĉ pli klare ol antaŭe montriĝis la ekvilibro de lia spirito, lia senŝpara sindonemo, la profunda boneco de lia koro, la simpleco kaj modesteco de lia animo, kvalitoj, per kiuj li ĉiam sukcesis glatigi ĉiujn malfacilaĵojn, tenante antaŭ si nur la altan idealon de Zamenhof. Kaj por tiu idealo li ofte vojaĝis de unu urbo al alia, por porti sian plaĉan, allogan parolon ĉien, kie estis necese naski, vivteni aŭ revivigi tiun flamon por kontribui al la fina venko.

En la Kongresoj li ne estis nur la altŝatata Prezidanto, sub kies gvido ĉio orde disvolviĝis en la plej simpatia atmosfero, sed li estis ankaŭ la aŭfbla, la kara amiko de ĉiuj, senkonsidere de la aĝo, de la vivkondiĉoj, de la socia tavolo, de la kultura grado. Kaj la Esperanto-kongresojn li ŝatis partopreni, ĉar en la esperantista medio li sentis sin hejme, en tiuj kunvenoj li trovis la deziratan distron ekster la kampo de siaj studoj.


Ni tute ne kapablas pensi, ke li ne estas plu in-

Prof. G. Canuto dum unu el la kunsidoj de la Estraro (Mainz, 1958) atente aŭskultas la protokoladon.





"Ĝis revido en Bruselo" — li diris, sed la malsano malhelpis lin partopreni la kongreson. Foto farita la 13-an de aprilo 1960 ĉe la stacidomo, antaŭ la forveturo de la vagonaro post la printempa kunsido de la Estraro.



Centoj da personoj, parencoj, amikoj, sciencistoj, studentoj, esperantistoj, eĉ de malproksimaj lokoj, profunde kortuŝitaj, sekvis la ĉerkon de Profesoro Canuto.

La lasta saluto de U.E.A.:
"Al sia kara Prezidanto
= Universala Esperanto
Asocio".



ter ni. Kvankam ni revidis lin muta, rigida kaj pala en la ĉerko, ni aŭdas ĉiam resoni en niaj oreloj lian varman voĉon, lian ĝojan ridon, kaj antaŭ niaj okuloj prezentiĝas lia rozkolora vizaĝo plena de serena ĉarmo. Sed tio estas nur iluzio.

Impona estis la funebra ceremonio okazinta la 31-an de oktobro posttagmeze: amaso da reprezentantoj de la scienca kampo kaj de la esperantistaro el multaj urboj de Italujo kortuŝitaj kunvenis por la lasta akompano de tiom valora kaj amata persono. Multaj ploris ĉe lia ĉerko, dum la memorigaj paroladoj, dum la entombigo; la gesamideaĵoj, kolektitaj ĉirkaŭ la esperantista flago, sekvis sian karan Prezidanton; kaj multaj aliaj estus volintaj troviĝi tie, sed pluraj cirkonstancoj tion malbligis: s-ro Holmes, vic-Prezidanto de U.E.A. kaj prof. Lapenna, Ĝenerala Sekretario, ne trovis lokon en la sola aeroplano, kiu estus povinta porti ilin ĝustatempe al Torino. Lia ĉerko eliris tra tiu pordo, en Corso Galileo Galilei 22, tra kiu tiom da fojoj li pasis ĉu pro sia universitata laboro ĉu pro Esperanto, ĉar tie, danke al li, troviĝas ankaŭ la sidejo de la Itala Esperanto-Federacio. Antaŭ tiu

pordo memorigis kaj salutis lin pluraj estimantoj, inter kiuj Prof. Allara, la Rektoro de la Universitato, la mondfama korkirurgiisto Prof. Dogliotti kaj adv. Barbiellini Amidei, vic-Prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio, en la nomo de la itala esperantistaro kaj de Universala Esperanto-Asocio. Poste, la funebra ĉaro, sekvata de la gefamilianoj kaj de longa procesio, direktiĝis al la preĝejo por la beno, kaj de tie al la tombejo, kun longa vico de aŭtomobiloj. Multaj florkronoj atestis la estimon kaj la amon, per kiuj esti ĉirkaŭita prof. Canuto: inter ili impona estis tiu de la tutmonda esperantistaro el grandaj flavaj krizanteĵoj, kun la skribo "Al sia kara Prezidanto — Universala Esperanto-Asocio".

Ĉe la tombejo en religia silento, kun la familio kaj la multaj intimaj geamikoj, ni ĉeestis la entombigon, post kiu ĉiuj mute disiris kun doloranta koro.

Al la de li tre amataj edzino kaj filo kaj al ĉiuj parencoj ni renovigas la esprimon de la plej varmaj kondolencoj.

Luigi Minnaja

MEMORIGA FONDAĴO PROF. D-RO GIORGIO CANUTO

Por esprimi plian omaĝon al la memoro de la forpasinta Prezidanto de UEA, Prof. D-ro Giorgio Canuto, la Estraro decidis krei specialan fondaĵon sub la nomo "Memoriga Fondaĵo Prof. D-ro Giorgio Canuto" kun la celo membrigi al UEA kiel M.J. aŭ M.A. esperantistojn el tiuj landoj, el kiuj oni ne povas pagi la kotizon.

La kontribuojn oni povas sendi aŭ al la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA, aŭ rekte al la C.O. de UEA en Rotterdam laŭ jenaj principoj:

1. La minimuma kontribuo estas la kotizo por M.J. aŭ M.A. laŭ la tarifo en la lando de la kontribuanto. Unuopa persono povas kontribui plurajn kotizojn M.J. kaj M.A. laŭ sia bontrovo. Aliflanke grupoj da personoj aŭ societoj kaj organizaĵoj povas kolektive kontribui unu aŭ plurajn kotizojn M.J. aŭ M.A.

2. Ĉiu kontribuanto indikas la nomon aŭ nomojn de la persono aŭ personoj, por kiu(j) li aŭ ŝi deziras pagi. Se iu kontribuanto ne deziras indiki la nomon aŭ la nomojn, li aŭ ŝi povas lasi la elekton al la C.O.

3. La C.O. tuj membrigos la personojn, por kiuj estas tiamaniere pagita la kotizo, aŭ mem elektos la personojn, se la nomoj ne estas indikitaj de la kontribuintoj. Tiamaniere el la Fondaĵo daŭre estos pagitaj al la ĝenerala kaso por la kotizoj tiuj sumoj, kiuj estos kontribuitaj ĝis tiu momento. La nomoj de la kontribuintoj regule aperos en la revuo "Esperanto" en la rubriko "Memoriga Fondaĵo Prof. D-ro Giorgio Canuto".

La Ĝenerala Sekretario de UEA, kiu faris la proponon, mem kontribuis tuj per 5 kotizoj M.A. por la jaro 1961. Li indikis 2 nomojn kaj petis la C.O. elekti laŭ sia bontrovo 3 pliajn.

La Estraro de UEA firme esperas, ke multaj esperantistoj, amikoj kaj sinceraj admirantoj de la nobla personeco de Prof. D-ro G. Canuto, multnombre sendos kontribuojn laŭ la supraj principoj kaj tiamaniere helpas al la vastigo de la universaleco de UEA, kreskigo de ĝia membraro, ĝenerala fortikigo — ĉio aferoj, por kiuj nia forpasinta Prezidanto laboris dum multaj jaroj ĝis sia lasta spiro.

DANKO PRO LA KONDOLENCOJ

Okaze de la forpaso de la Prezidanto de UEA, Prof. D-ro G. Canuto, la Asocio ricevis grandan nombron da kondolencoj fare de diversaj Esperanto-Organizaĵoj kaj unuopuloj el ĉiuj partoj de la mondo.

En la nomo de la Komitato kaj Estraro de UEA ni esprimas nian profundan kortuŝon pro la kondolencoj kaj simpatioj montritaj en tiu ĉi doloriga evento.

W. H. Holmes, O.B.E.

Vicprezidanto kaj aganta Prezidanto

Prof. D-ro I. Lapenna
Ĝenerala Sekretario

AGANTA PREZIDANTO

La Estraro de UEA informas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, ĉiujn membrojn kaj la tutan esperantistaron ke, ĝis la elekto de la nova Prezidanto dum la Universala Kongreso en Harrogate, la Vic-Prezidanto s-ro H. W. Holmes, O.B.E. funkcios kiel aganta Prezidanto de la Asocio kaj kiel tia plenumos ĉiujn taskojn de la Prezidanto laŭ la Statuto kaj Regularoj de UEA.

La Estraro

NIA "TAGO DE LA LIBRO" KAJ ĜIA SIGNIFO

Ĉiujare en decembro la esperantistoj festas la Zamenhof-tagon, kiu samtempe fariĝis tradicie ankaŭ la Tago de la Libro. Kiel pli bone oni povus honori la aŭtoron de nia lingvo, ol per speciala atento al tiu literaturo, al kiu li mem tiel sindone dediĉis sin kaj kies gravecon por la afero li tiel perfekte komprenis?

La literaturo estas aparte grava por ĉiu lingvo, sed tute speciale por la lingvo internacia, kies posedantoj estas disigitaj tra la tuta mondo kaj nur relative malofte (kompare kun la naciaj lingvoj) havas okazon parole certigi la daŭran vivon de la lingvo. La literaturo estas la perilo de la lingva kulturo, kaj ne malofte ĝia plej alta atingo.

Tute specialan rolon havas la Esperantaj libroj en la vivo de ĉiuj seriozaj esperantistoj. Vivante, kun treege malmultaj esceptoj, en medio naci-lingva, ili dum la plimultaj tagaj horoj pensas, parolas, legas kaj skribas sian nacian lingvon. Sed vespere, en la trankvilo de la hejmo, ili povas eniri alian medion: la medion de la internacia amikeco kaj kompreniĝo. Malfermante Esperantan libron, ili tuj troviĝas en la regno de la Espero, kaj el la paĝoj disradias al ili varma sento de komuna homeco kun la homfratoj el plej malproksimaj teranguloj.

Al homoj, kiuj ankoraŭ ne scias Esperanton, estas kelkfoje malfacile komprenigi, kia estas la literaturo de la Internacia Lingvo. Kaj estas same malfacile komprenigi al ili, ke la abunde aperintaj kaj aperantaj verkoj estas plejparte normalaj komercaj eldonaĵoj, kaj ke ilia aperigo absolute dependas de la aĉetpovo kaj aĉetemo de la publiko. Tre maloftaj estas tiuj eldonaĵoj, kiuj aperas dank' al financa subvencio de oficialaj instancoj. Ni ĝojas, kiam ajn klarvida registaro aŭ alia instanco komprenas la gravecon de nia lingvo kaj ebligas la eldonon de verko aŭ verkoj; sed ni konstatas, ke ĝenerale niajn librojn eldonas privataj eldonejoj, je sia propra risko. Kaj tiurilate (kiel en ĉiuj komercaj aferoj) tiu, kiu proponas bonan varon, akiras bonan klientaron.

Aperis kaj daŭre aperas bonaj verkoj pri ĉiaj temoj en Esperanto. Ĉiujare, je la Tago de la Libro, la esperantistoj faras specialan streĉon por akiri almenaŭ unu novan libron. Tiamaniere ili ne nur

UNUAJ KONTRIBUOJ AL "MEMORIGA FONDAĴO PROF. D-ro GIORGIO CANUTO"

Prof. D-ro I. Lapenna, Britujo, 5 M.A.; S-ro Luigi Minnaja, Italujo, 5 M.A.; S-ro E. J. Woessink, Nederlando, 5 M.A.; N.N. Germanujo, 5 M.A. kaj 1 M.J.; S-ino Kirsten Zacho, Danlando, 2 M.A.; S-ino Birthe Zacho, Danlando, 1 M.A.; F-ino M. H. Vermaas, Nederlando, 3 M.A.
Entute 26 M.A. kaj 1 M.J.

plezurigas sin, sed ili ankaŭ metas ankoraŭ unu brikon al la konstruaĵo, kies fundamenton metis D-ro Zamenhof antaŭ sepdek tri jaroj.

W. Auld

DANKESPRIMO DE LA REDAKTORINO

Tiu ĉi numero de *Esperanto* estas la lasta, kiun mi redaktis. Ekde la nova jarkolekto reprenos sian lokon en la redaktora seĝo Mag. *William Auld*.

Kun ne malmulte da dubo pri la propraj kvalifikoj mi antaŭ ĉ. 2½ jaroj laŭ instigoj de la Estraro de U.E.A. akceptis transpreni la redaktadon de la revuo, sed la laboro interesis min kaj ankoraŭ interesas min. Pro tio mi tre bedaŭras, ke mia privata laboro kaj mia ne tute kontentiga sanstato devigis min fini tiun servadon al la Internacia Lingvo.

La redakta laboro kontaktis min kun multaj esperantistoj, kaj mi povis ĝoji pro preskaŭ senescepte bonega kunlaborado kun ĉiuj. Mi treege kore dankas al tiuj multnombraj personoj, el kiuj mi deziras speciale nomi kelkajn ĉi tie.

Dolorige estas por mi, ke mia danko al la Prezidanto, Prof. D-ro *Giorgio Canuto*, venas tro malfrue. En la ĉiutaga praktika laboro pri la revuo mi ne interrilitis kun la Prezidanto, sed ekz. en estrarkunvenoj mi havis okazon senti lian amikan, lojalan subtenon.

Pro ĉiama preteco por helpi la novan, antaŭe senspertan redaktorinon kaj cetere pro lia admirinda, senlaca aktiveco por nia Asocio mi dankas al la Ĝenerala Sekretario, Prof. D-ro *Ivo Lapenna*.

Kaj mi dankas pro la bonaj kunlaborado kaj helpo pri la praktikaj aferoj rilate al pretigado kaj ekspedado de la revuo al la Direktorino de la Centra Oficejo, F-ino *Marianne Vermaas*, kaj al la *Presejo Zwagers*.

Rekomendi la novan redaktorinon al la legantoj estas ja nenecese. Li ja nur rekomencos sian laboron, kiun li bedaŭrinde devis interrompi por kelka tempo. Mi deziras al S-ro *Auld* prosperan tempon kiel redaktoro kaj esperas, ke la membroj de U.E.A. kaj la legantoj de *Esperanto* ankaŭ al li montros helpemon kaj kunlaboremon.

Kirsten Zacho.

Dumtempe en la Blegdam-Hospitalo, Kopenhago.

PRIESPERANTA INFORMADO EN ITALUJO

La agado de la Esperanto-Movado estas multflanka kaj kompleksa. Ne ĉiuj branĉoj de tiu agado funkcias same bone en ĉiuj landoj, sed certe la spertoj de tiuj, kiuj atingis plej kontentigajn rezultojn, povas esti almenaŭ parte utiligitaj en aliaj landoj. La itala Informa Fakto estas sendube unu el la plej bonaj. En la subaj linioj ĝia gvidanto, s-ro Renato Pennazio, prezentas kelkajn siajn spertojn kaj ideojn. — La Redakcio.

En la julia-aŭgusta numero de "Esperanto" aperis la kutima tabelo pri la informa laboro farita dum la pasinta jaro (1959). La legado de tiuj paĝoj mirigis min, ĉar oni povis konstati, ke dum la Zamenhofa Jaro, en multaj landoj malkreskis la statistikaj ciferoj de iuj aktivecoj, kiuj devus stari unuarange en nia internacia inform-agado. Kuraĝiga, jes, estas la konstato, ke multaj aranĝitaĵoj estis pli bonkvalitaj ol pasinte, tamen restas ĉiam la impresoj, ke ĝenerale oni ne sufiĉe "streĉis" por atingi tiujn celojn, kiujn ebligis la apartaj kondiĉoj de la okazo. Sed, pli ol ĉio, mirigis min la fakto, ke ankoraŭ nun (en epoko kiam la "organizaj teorioj" regas en ĉiu homa kampo, pri scienco aŭ komerco, pri politiko aŭ pri simplaj amasaj asistado kaj amuzigo), en ĉi tiu dua duono de la XX-a jarcento, granda nombro da landaj E-asocioj ne havas specialan informan fakon. En la nuna situacio, tia fakto "ne povas manki", se oni volas atentigi la grandan publikon, kaj se oni volas atingi la apartajn mediojn, kiuj solaj povas helpi nin por konvinki — pli malpli baldaŭ — la amasojn, ke Esperanto *necesas*.

Starigo de landa informa fakto povas aspekti — por novulo — tre malfacila afero. Tamen la afero estas plifaciligita de la ekzemploj jam ekzistantaj kaj samtempe de la koncerna "principaro" tiucele decidita (poste konfirmita) en Frostavallen. Fakte por organizi tian Fakon, hodiaŭ necesas nur la decido de la landa asoci-estraro kaj *unu* persono, kiu estu preta doni sian tutan liberan tempon por tiu tasko.

Pri la "teorio" de nia informado, ĉio estas jam preta: gravuloj kaj spertuloj de nia movado, kunvenintaj en la antaŭdirita sveda loko, zorgis detale kaj tre trafe tiun punkton. Pri la "praktiko" ege utilas la aro da cirkuleroj kaj da dokumentoj havigitaj, ekde jaroj, fare de la U.E.A.-Informa Fakto kaj de C.E.D.; plie, povas helpi la klarigoj (aŭ, se vi volas, la konsiloj) doneblaj de personoj, kiuj jam realigis enlande la principojn de Frostavallen. Tion ĉi lastan mi faras nun (akceptante la koncernan, afablan, proponon de Prof. Lapenna) metante je dispono de ĉiuj agemaj esperantistoj la personan sperton akiritan dum kvin jaroj da agado kaj la instruojn devenintajn de la laboro plenumita (dum aliaj kvin jaroj) fare de la antaŭa estro (Gian Carlo Fighiera): de tio, kion ni nomis "Inform-Oficejo de Itala Esperanto-Federacio". La leganto povos tiel kompreni, kiel ni povis kolekti ĉiam kreskantajn bonsukcesojn,

ankaŭ en la Zamenhof-Jaro. La afero tute ne estas mirakla; ĉiu ajn Esperanto-Asocio povus fari almenaŭ la samon, praktikigante la sistemon de ni uzitan. Por pli da precizeco, ni dividis la klarigojn laŭ la jenaj punktoj:

1. Strukturo de Inform-Oficejo de I.E.F.
2. La labor-kampoj de la I.O.
3. La psikologia sinteno antaŭ neesperantistaj medioj kaj antaŭ la kunlaborantoj.

(1) LA STRUKTURO DE "INFORM-OFFICEJO"

Ĝi konsistas el t.n. direktoro — kiu zorgas kaj kunordigas la tutan landan agadon — el "specialaj komisiitoj" kaj el "lokaj kunlaborantoj". Ĉi tiuj lastaj estas personoj akceptintaj labori en sia urbo aŭ provinco. Komence de ĉiu jaro, ili subskribas koncernan aliĝilon, senditan de I.O. kun plurpaĝa cirkulero; tiu dokumento entenas la laborplanon por la ĵus komenciĝinta jaro. La "lokaj" kunlaborantoj laboras en strikta kunligo kun la urba Esperanto-Grupo, se ĝi ekzistas; alikaze, ili laboras kiel izoluloj.

"Specialaj komisiitoj" estas esperantistoj kiuj evidentiĝis aparte *lertaj*; ili akceptas zorgi la lanĉon kaj la disvolviĝon de tutlandaj iniciatoj, kiel prelegvojaĝoj, eŭropaj kampanjoj, fondo de novaj Esperanto-stratoj, distribuo de E-filmoj, k.s.; kelkfoje, tiuj "specialaj komisiitoj" loĝas en urboj tre malapudaj de la centra sidejo de I.O. de I.E.F., tamen tio ne malhelpas. La lokaj kunlaborantoj anstataŭe havas ĝeneralajn taskojn: efektiviĝi la iniciatojn planitajn de la centra direkto; insisti ĉe la lokaj gazetoj por publikigo de priesperantaj informoj aŭ artikoloj; kontakti la aŭtoritatojn aŭ gravajn instancojn de la urbo, celante ricevi helpon por pli bona sukceso de la aranĝitaĵoj. Kompreneble ankaŭ ĉe ni okazas, ke personoj aliĝas kiel "kunlaborantoj" kaj poste ne plu donas vivsignon kaj forgesas ĉiujn ajn intencojn pri agemo. Tamen restas ĉiam sufiĉa elcento da laboremuloj, kiuj per komuna laboro (samtempe kun apartaj iniciatoj disvolvigataj de la centra oficejo mem) ebligas — je ĉiu jarfiniĝo — la kunmeton de statistikaj tabeloj, indikintaj ĝis nun senhalte kreskantajn bonsukcesojn.

La "laborplano", kiun ni dissendas, antaŭvidas 20-25 punktojn (iniciatojn); ĝis nun ni ne sukcesis realigi ĉiujare la tutan programon, sed ĉiam ties plej grandan parton. Iuj iniciatoj estas "konstantaj" (t.e. la kontaktoj kun la lokaj gazetoj kaj kun

la radio, kun publikaj bibliotekoj, k.t.p.); aliaj vivas unu aŭ du jarojn kaj finiĝas nur kiam oni atingis la deziratan rezulton (ekz: tiu pri novaj Esperanto-stratoj; komencita en 1958-a j. kaj finita oficiale la 31/XII/60).

Tria klaso de iniciatoj estas tiu, kiu ŝajne estas konstanta laŭprograme, sed efektivigata nur kiam tion permesas la kondiĉoj (ekzemple, la prelegvojaĝoj aŭ la filmoj kun E. parolo. La prelegantojn kaj la filmojn ni proponas precipe al neesperantistaj instancoj (krom al E-kluboj), havigante ankaŭ la tradukan materialon aŭ la tradukiston. Ĝis nun en Italujo, la filmoj estas daŭre montrataj pli en ŝtataj lernejoj (kie ofte oni neniam eĉ aŭdis pri Esperanto) ol en E-kluboj.

(2) LA LABORKAMPOJ DE LA ITALA INFORM-OFICEJO:

Nun, jen la listo de la laborpunktoj antaŭviditaj per la laste aperinta plano (kiu rilatas la agadon dum la 1960-a j.):

1. *Notiziario Internazionale* (Internacia Noticaro): Monata multobligita bulteno, ĝi estas la kerno de nia landa agado ĉe ĵurnalismaj medioj; oni ĝin dissendas al preskaŭ ĉiuj gazetoj, ĝi entenas itallingvajn novaĵojn pri la sukcesoj de nia movado. 2. *Specialaj Komunikoj*: Krom tiuj de *Notiziario Internazionale*, en iuj okazoj ni havas, al apartaj gazetoj, informojn pri faktoj precipe interesaj por ili. 3. *Gazetaraj Esperanto-Kursoj*: Ekde kelkaj monatoj, multaj gazetoj estas pli emaj ol pasinte publikigi tiajn kursojn; lastatempe, ni sukcesis aperi samtempe 6 kursojn, redaktitajn de 4 personoj. 4. *Polemikoj*. Kiam aperas artikoloj kontraŭaj al Esperanto, aŭ misinformantaj pri ĝi, ni klopodas havigi la koncernajn respondojn por publikigo; ĝenerale, tiu agado ĝis nun estis bonsukcesa. 5. *Artikol-Servo*: Ni havigas, al italaj gazetoj, artikolojn aperintajn originale en E. kaj tradukitajn itallingven; jam multaj tiuspecaj verketoj aperis, tamen la organizo definitiva de tiu punkto ne estas ankoraŭ preta. 6. *Prelegvojaĝoj*: Arango de prelegvojaĝoj efektivigataj de ne-italaj esperantistoj; la prelegoj devas okazi precipe en neesperantistaj rondoj. 7. *Vojaĝanta Ekspozicio*: Ĝis nun, ni laboris nur por pretigi la plej taŭgan materialon, sed baldaŭ ankaŭ la "ekspozicio" estos realaĵo. 8. *Dokumentoj*: aperigo de dokumentoj (broŝuretoj aŭ plurpaĝaj faldfolioj) informantaj pri Esp. 9. *Filma Servo*: Disponigo de ekzistantaj dokumentarioj kun esperantlingva parolo. 10. *Turisma Servo*: Kolekto de ĉiuj novaperintaj esperantlingvaj turismaj presitaĵoj, por ilin havigi kiel "dokumentado" al italaj turismaj instancoj, kaj por ilin plifacile konvinki publikigi novajn prospektojn en nia lingvo. 11. *Esperanto-Stratoj*: Insista peto de niaj urbaj kluboj ĉe la koncernaj magistratoj, por ke oni ankaŭ enloke fondu Zamenhof- aŭ Esperanto-stratojn. 12. *Radio-*

T.V.: Peto al la redaktoroj de regionaj aŭ naciaj radio-TV programoj, por diskonigo de niaj iniciatoj. 13. *Magnetofona Servo*: Ĝis nun, ni havigis al esperantistoj nur la sonbendojn esperantlingvajn, por aŭdigo al la lokaj grupoj; sed nia intenco estas pretigi ankaŭ "helpajn" sonbendojn, uzeblajn por neesperantistoj. 14. *Publikaj Bibliotekoj*: Insistado ĉe la esperantistoj, ke ili donacu Esperanto-verkojn al la lokaj publikaj bibliotekoj. 15. *Foto-Servo*: Preskaŭ nova iniciato; kolektado de aparte interesaj fotoj, pri E-okazintaĵoj, disdoneblaj al italaj gazetoj por publikigo. 16. *Unesko kaj U.N.*: Enlanda realigo de eventualaj kampanjoj — temantaj pri la du organizaĵoj — sugestitaj de U.E.A.-Informa Fako. 17. *Eŭropo*: Same kiel pri UNESKO kaj U.N. — 18. *Kontaktoj kun aliaj instancoj*: Temas pri naciskalaj asocioj, precipe popolklerigaj aŭ asistcelaj; en Italujo la plej gravaj estas 3-4 (inter ili, la aro da Popolaj Universitatoj). Aŭ fare de la centra Inform-Oficejo aŭ per la lokaj Kunlaborantoj kaj Grupoj, oni kontaktas kun ili, celante ricevi apogon por nia afero aŭ organizigi E-kursojn ĉe iliaj provincaj (aŭ urbaj) sidejoj. Estas ankoraŭ iuj punktoj, en la antaŭdirita laborplano por 1960-a j., sed ili rilatas nuancojn de la antaŭdiritaj punktoj. Oni povas konstati, ke iuj programeroj sin strikte kateniĝas, kiel la 1- 2- 3- 4- 5- kaj 15, rilatantaj, sub diversaj aspektoj, la agadon ĉe la gazetaro; agado, kiu restas ĉiam la plej grava.

(3) LA "TEORIO" DE LA LABORO:

Ĝis nun ni klarigis nur la "organismon" de I.O.; tamen estas ankaŭ atentinda alia faktoro: nome, la maniero per kiu oni kontaktas kun la kunlaborantoj, unuflanke, aŭ precipe kun la neesperantistaj medioj. Tiu-ĉi faktoro estas gravega. Oni povus diri, ke plej ofte sukceso dependas nur de la procedo uzita por proponi iun ajn iniciaton. Jen la t.n. sistemoj:

I). *Kun la Kunlaborantoj*: kiam ni komencas novan iniciaton, estas sendata cirkulero, kun sugestoj pri la plej taŭga(j) sistemo(j) uzebla(j) por bonsukcesi. Oni ofte aldonas materialon, kiel fotokopiojn de dokumentoj aŭ similaĵoj, prezenteban al la neesperantistoj (ekz.: pri la iniciato por fondi novajn E-stratojn, ni sendis, aldone al cirkulero, fotokopiojn de leteroj de urbestroj jam decidintaj fondi la stratojn; plie ni aldonis multobligitan liston de ĉiuj E-stratoj nun ekzistantaj en la mondo). Alia faktoro: de tempo al tempo necesas *rememorigi* iniciaton al la kunlaborantoj mem; tiucele, dum preskaŭ 2 jaroj, ni sendis 4 cirkulerojn pri temo "stratoj" (el ili, 3 entenis liston de novaj E-stratoj ĵus inaŭguritaj, por aktualigo de la unua listo). Kompreneble, por sekvi tiun iniciaton necesas, krom la lokaj kunlaborantoj kaj la direkto de I.O., almenaŭ du aliaj specialaj komisiitoj; en tiu ĉi kazo, s-anino G. Fop kontaktis

eksterlandajn E-asociojn por ricevi freŝajn informojn, kiuj ebligis la konstantan aktualigon de la listoj; s-ano F. Franceschi zorgis (post la starto de la iniciato) la korespondadon kaj havigon de plia dokumenta materialo al la esperantistoj, kiuj bezonas tion por pli bone labori.

Al ambaŭ (kiel al ĉiu ajn alia "speciala komisiito") oni havigis la oficialan paperon por korespondi kaj la poŝtmarkojn; nome ili laboris senpage, kiel ĉiu membro de I.O.

II) *Kontaktoj kun neesperantistaj instancoj*: Povas temi pri registaraj oficejoj, aparte interesaj kulturaj aŭ asistad-societoj, deputitoj, famkonataj ĵurnalistoj, verkistoj, sciencistoj aŭ similaj. Pri ĉi tio, mi klarigas nur la procedon de la kontaktoj rekte farataj de la direkcio de nia informafako (al la kunlaborantoj ni sugestis agi same, kiam ili laboras en "samaj cirkonstancoj"):

a) plej ofte, la direkcio de I.O. kontaktas perletere, kaj gravega punkto estas la "tono" de la leteroj (aŭ cirkuleroj); se ni skribas al asocioj, ni uzas stilon tre afablan, kiu tamen implice donas la impreson, ke ni konsideras nian movadon same grava kiel tiun, kiu ricevas nian korespondaĵon; tio, ankaŭ se ĝi estas ĝenerale konsiderata grave-

ga instanco de la plimulto. Finfine, ni celas havigi la impreson — sed en formo tre "diskreta" — ke ni kaj ili estas samnivelaj.

b) Se ni kontaktas deputitojn, ministrojn aŭ internaciajn aŭtoritatojn, ni skribas tre respektive, tamen en maniero, kiu montras ankaŭ, per si mem, nian kvaliton de reprezentantoj de movado internacie tre grava.

Atentinde: mi substrekas, ke tiun impreson ni celas doni per la "implica tono" de nia korespondado, sed sen tro da vortoj kaj sen "reklamaj frazoj".

Kompreneble se oni devus detale klarigi ĉiujn erojn de nia labormetodo necesus paĝoj kaj paĝoj, sed ni esperas, ke la supraj klarigoj sufiĉas; krome, se kelkaj legantoj deziras koni pli detale la disvolviĝon de iu aparta iniciato, ni tre volonte havigos la koncernajn detalojn.

Antaŭ ol fini, mi deziras ankoraŭ substreki la absolutan neceson de modernaj informaj fakoj, daŭre laborantaj en multaj kampoj, en la kadro de ĉiu landa asocio. La moderna vivo mem tion postulas.

Renato Pennazio

ALVOKO

POŬTISTOJ, TELEKOMUNIKISTOJ !

Kvankam la Unuiĝo Poŝta Universala (*Union Postale Universelle, UPO*) kaj la Unuiĝo Telekomunikada Universala (*Union Internationale des T  l  communications, UIT*) iam akceptis kiel oficialan interlingvon la francan (kaj por pure teknikaj aferoj la anglan), la Svisa Esperanto-Societo (en Bern) entreprenas traduki esperanten la oklingvan oficialan vortaron preparatan de laborgrupo de la internacia oficejo de UPU kaj la deklingvan terminaron preparatan de la studkomisiono de la Internaciaj Konsultaj Komitatoj pri Telegrafio, Telefonio, Radio ktp (*CCIT, CCIF, CCIR ktp*). La prezidanto de la Svisa Esperanto-Societo, oficisto    la jura sekcio de la Ĝenerala Direkcio de la Poŝtoj en Berno, komisiis pri tiu traduko esperanten s-ron Karl Curchod, Rue du Valentin 45, Lausanne, Svislando. La tradukon kontrolos la Unuiĝo de Esperantistoj-Poŝtistoj, 20, rue de S  gur, Paris (7), prezidanto : s-ro J. Collomb, kaj la publikigo okazos sub la aŭspicio de la Direktoro de la Sekcio por Teknikaj Vortaroj de la Akademio de Esperanto, dipl. ing. R. Haferkorn.

Tuj kiam la traduko el la franca lingvo estos preta, pro adaptado de la esperantaj terminoj s-ro Curchod sendos ekzemplerojn al poŝtistoj-telekomunikistoj en tiuj landoj kies nacilingvo respondas al la koncernaj lingvoj. Pri la franca, germana kaj nederlanda lingvoj li jam trovis kunlaborantojn.

Per la ĵusaj linioj ni alvokas pro terminologia kunlaborado niajn fak kolegojn parolantajn la ceterajn sep lingvojn, nome la *anglan, hispanan, italan, polan, portugalan, rusan kaj svedan*. Ili anoncu sin kiel eble plej baldaŭ    s-ro K. Curchod.

*A. R. Haferkorn,
Direktoro de la Akademia Sekcio por
Teknikaj Vortaroj*

CIRKLO   IRKAŬ LA MONDO

Unu el la nederlandaj radio-unuiĝoj intencas efektiviĝi planon, kiu povas esti tre propagandefika por Esperanto kaj kiu pro tio meritas viajn plenajn kunlaboron kaj subtenon.

La radio-unuiĝo deziras krei "Cirklon   irkaŭ la mondo" pere de Esperanto-elsendoj por la junularo (7—13 jaraĝgeknaboj). La plano estas jena: la nederlanda radio-stacio elsendas unue programon por la nederlanda junularo kaj petas, ke oni mem faru ian malmultekostan donaceton (desegnaĵon, fotografiaĵon ktp, tipa por lando) por sendi al eksterlanda amik(in)eto. En posta elsendo oni elsendos programon en Esperanto de infanoj el iu ajn lando, kiuj do jam ricevis la donacetojn. Tiun programon, kiu enhavu popolkantojn, muzikaĵojn, dancojn ktp, tipaj pri tiu lando, la gvidanto de la eksterlanda infangrupo fiksus sur magnetofonbendon. Poste la eksterlanda infangrupo ricevos la magnetofonbendon kun programo de la nederlanda infangrupo.

Per tiu   i serio da elsendoj,   iumonate pri alia lando, la nederlanda radio-unuiĝo esperas en kunlaboro kun la esperantistaro, krei CIRKLON   IRKAŬ LA MONDO. Gvidantoj de infangrupoj, kiuj povas disponi pri magnetofona aparato, bonvolu eble plej baldaŭ kontakti kun mi, por ke ni povu komenci la elsendojn antaŭ la jarfiniĝo.

*Hengelolaan 1027, Den Haag NEDERLANDO
A. M. D. KORFF*

KOREKTO

En la Oktobra numero 1960 de "Esperanto" sur paĝo 166, en la rezultoj de la Belarta Konkurso en  steliĝis ĝeneraro. Sub Sekcio 2, premioj 1 kaj 2, estas menciite, ke la tradukoj de S-ro Samyn estas faritaj el flandraj originaloj. Tio estas erara. Ambaŭ estis el la nederlanda. Nekk Hooft, nek Poot estis flandroj aŭ verkis en flandra.

La Redakcio.

CED

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

ENKETO PRI ESPERANTO EN LA LERNEJOJ

Kiel konate, CED entreprenis apartan esploron kun la celo eltrovi la precizajn informojn pri la nombro de esperantistoj-instruistoj kaj pri la lernejoj, en kiuj oni instruas Esperanton. La enketon faris tre konsciencie kaj akurate s-ro D. Kennedy, kunlaboranto de CED pri lernejaj aferoj.

La provizoraj rezultoj estis publikigitaj en formo de tre klara tabelo en la dokumento CED/INT./10, kiu estis poste disdonita al ĉiuj, kiuj partoprenis en la laboro de la Unua Sekcio de la U.K. en Bruselo.

La informoj en la tabelo estis donitaj laŭ la respondoj ricevitaj ĝis la 30-a de junio 1960. Kvantam la dokumento CED/INT./10 estas nur por interna uzo de la personoj laborantaj nun sur la kampo de la granda kampanjo por Esperanto en la lernejojn, tamen almenaŭ kelkaj ĝeneralaj informoj estas interesaj por la tuta esperantistaro.

La rezultoj de la enketo montras, ke en la lerneja jaro 1959/1960 Esperanto estis instruata en 153 lernejoj de 24 landoj, nome (parenteze estas indikita la nombro de lernejoj): Aŭstralio (1), Aŭstrio (2), Belgujo (1), Brazilo (6), Britujo (20), Bulgarujo (1), Ĉeĥoslovakio (1), Danlando (2), Finnlando (3), Francujo (46), Germanujo Okcidenta (10), Germanujo DDR (1), Grekujo (11), Hispanujo (2), Hungarujo (1), Italujo (5), Japanujo (4), Jugoslavio (16), Nederlando (4), Pollando (9), Soveta Unio (2), Svedlando (1), Svislando (1), Usono (3). La nombro de lernantinoj aŭ studentinoj en ĉiuj ĉi lernejoj estis 3.841 kaj la nombro de lernantoj aŭ studentoj estis 3.523 do entute 7.364 gelernantoj.

Al la enketo A/, nome pri la geinstruistoj, kiuj scipovas la Internacian Lingvon, bedaŭrinde venis ĝis la 30-a de junio nur 242 respondoj el 30 landoj. Post la 30-a de junio venis kelkaj pliaj informoj: 2 lernejoj en Urugvajo, 3 pliaj lernejoj en Svislando, 2 pliaj en Danlando kaj 111 pliaj en Jugoslavio (tiu lasta laŭ la raporto farita en Bohinj). Sekve, la nuna stato prezentiĝas jene: 261 lernejoj en 25 landoj kun entute 10.695 gelernantoj en la lerneja jaro 1959/1960.

Tre kredeble la nombro de lernejoj estas ankoraŭ pli granda kaj sekve ankaŭ la nombro de gelernantoj. Se oni konsideras, ke nur 16 lernejoj respondis al la enketo de CED el Jugoslavio (mal-

graŭ la plurfojaj petoj kaj alvokoj respondi al la demandaro) kaj ke poste evidentiĝis en Bohinj, ke nur en Jugoslavio la lingvo estis kaj plue estas instruata en 127 lernejoj, oni vidas facile la realaĵon. Kompreneble, estas tre bedaŭrinde, ke al tiel gravega enketo tutcerte multaj lernejoj ne respondis, sed tamen, eĉ la rezultoj havigitaj pere de la ĝisnunaj respondoj, montras grandegan progreson de la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj kaj tial kontentigan situacion. Temas ja pri pli ol 10 mil junaj gelernantoj de Esperanto el 25 landoj, kaj tio estas pli ol la tuta individua membraro de UEA! Senkonsidere al la utiligo de la informoj havigitaj per la enketo en la lerneja kampanjo, la instruistoj kaj instruistinoj en tiuj lernejoj, kiel ankaŭ niaj landaj asocioj kaj lokaj organizaĵoj, havas nun grandan respondecon konservi tiujn valoregajn elementojn — nian junularon — por la Esperanto-Movado. Estas belege atingi la rajton instrui. Estas ankoraŭ pli bona la fakto, ke efektive la lingvo estas instruata en tiom da lernejoj. Tamen, tio ne sufiĉas. Necesas fari la lastan paŝon: firme ligi en tiu aŭ alia formo la lernintojn al la Esperanto-Movado. Depende de ilia aĝo oni devas instigi ilin aŭ aliĝi al UEA kaj al la koncerna landa asocio, aŭ al TEJO, aŭ formi apartan studentan aŭ gelernantan grupon.

Estas utile aldoni ke laŭ ILEI ekzistas almenaŭ 2.504 geinstruistoj-esperantistoj en 14 landoj. Ankaŭ tiu nombro certe estas konsiderinde pli granda. Tamen, CED disponis nur pri 242 respondoj, al kiuj poste aldoniĝis kelkaj pliaj, entute el 30 landoj.

CED daŭrigas tiun ĉi enketon kaj intencas ĝin konstante kompletigadi. En la lerneja kampanjo ni devas havi daŭre kiel eble plej kompletajn kaj ĝisdatajn informojn pri la afero. Tial CED ankoraŭfoje varme apelacias al ĉiuj geinstruistoj doni sian etan helpon (per nura respondo!) en tiu grava kaj malfacila tasko. Al s-ro D. Kennedy, fidela kunlaboranto de CED, plej koran dankon pro lia konsciencia laboro. Ĉiuj informoj estu ĉiam senditaj al la adreso de s-ro D. Kennedy, 21, Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo.

TRADUKMAŝINOJ KAJ KOSTOJ DE MULTLINGVECO

CED entreprenis du pliajn gravajn esploralaborojn. S-ro Victor Sadler, B.A. (Cambridge) entreprenis kun kelkaj kunlaborantoj la esploron de la nuna stato de tradukado per tradukmaŝinoj kun aparta konsidero al la rolo de la Internacia Lingvo tiurilate. S-ro D-ro Werner Bormann, Docento de Ekonomio en la Administracia Lernejo de Hamburgo akceptis la taskon esplori, en kunlaboro kun la Direktoro de CED, la kostojn de multlingveco en internaciaj organizaĵoj, konferencoj kaj entute

en la internaciaj rilatoj. Kompreneble, ne estos eble esplori ĉiujn aspektojn de la ampleksega problemaro, sed verŝajne nur la plej gravajn.

Ambaŭ enketoj certe daŭros kelkajn monatojn kaj eble eĉ 2—3 jarojn. La tasko estos iom faciligita pro la kunlaborado kun ASLIB establita antaŭnelonge per la aliĝo de la Direktoro de CED al tiu organizaĵo.

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
La stato je la 25-a de majo 1960	70-	6-	0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	1-	0-	0
S-ro Bertil Englund, Svedujo	2-	0-	0
S-ro Cadenel, Francujo	15-	0	
S-ro Sikora, Francujo	2-	2	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
Kultura Kooperativo de Esperanto, Brazilo	19-	0	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
Itala Esperanto-Federacio, Italujo	9-	-	1
S-ro Louis Repini, Argentino	18-	11	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
N.N. en V. Nederlando	2-	7-	3
KoKoKo, Danlando	7-	12-	2
S-ino Vincent, Francujo	15-	0	
S-ro Frank Thurgood, Britujo	2-	6	
Stato je la 10-a de novembro 1960	99-	0-	1

Koran dankon al ĉiuj donacintoj. Tute specialan dankon al s-ro H. V. Rasmussen el Danlando, kiu dum jaroj preskaŭ ĉiumonate kaj kelkfoje eĉ plurfoje en la monato donacas al CED. Vere imitinda ekzemplo! Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ rekte la oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

OLDENBURGO ATENTIGAS !

La redakcio de la "Oldenburga Esperanto-Sendito" fondis novan servon, kiu provizore eklaboris sub la adreso de la ĉefresponso redaktoro:

CENTRA SERVO PRI PROSPEKTOJ KAJ BROŝUROJ (CSPB) p/a Oldenburga Esperanto-Sendito (23) Oldenburg, am Festungsgraben 53, Germanujo.

La celo estas la kolektado amasa de esperantlingvaj prospektoj kaj broŝuroj kaj la dissendo de ili al bezonantoj. Per la grandskala kolektado ni volas krei centran oficejon kiu ĉiam kapablas disponigi al iu ajn bezonanto la necesan materialon aŭ por turismaj celoj aŭ por varbaj aranĝoj.

- Do ni petas ĉiujn esperantistojn transsendi al ni
- 1-e) kiel eble plej multajn esperantlingvajn prospektojn aŭ broŝurojn pri iliaj urboj kaj landoj;
 - 2-e) la adresojn de ĉiuj oficejoj kiuj eldonis ian taŭgan materialon.

La reguloj de CSPB estas la jenaj:

- 1-e) La servo-uzanto pagas al CSPB la faktajn elspezojn en formo de sialandaj validaj poŝtmarkoj, monbiletoj, steloj aŭ ia egalvaloro, kiun CSPB devas antaŭe aprobi.
- 2-e) CSPB repagas al ĉiu material-sendanto la faktajn elspezojn, sed maksimume 1.—gm (3 stelojn) po sendaĵo!

Do, kunlaboru por ke post mallonga tempo ni havu mondiskalan efikan servon!

U. J. M.

POSTKONGRESO DE LA 45-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Sabaton la 6-an de aŭgusto oni foriris de Bruselo per vagonaro al Lieĝo, kie oni aŭtobuse vizitis la urbon. La prezidanto de Lieĝa Esperantista Grupo, d-ro Denoël, gvidis kaj kondukis i.a. sur monteton, kie staras la malnova kaj historia citadelo de la urbo, kaj kie multaj belgaj patriotoj estis pafmortigitaj pro patriotaj agoj. De tie oni havas belegan vidaĵon pri la valo, kie situas la urbo kaj kie fluas la riverego "La Mozo".

La postan tagon, dimanĉon, oni alvenis en Akeno, kie granda flagrubando kaj kanthoro bonvenigis. Denove en Akeno aŭtobusoj kondukis al la urbaj vidindaĵoj, inter kiuj oni eble menciis urban akvoturon, de kies supro rava panoramo etendiĝis antaŭ la partoprenantoj. En la urbdomo oni akceptiĝis de la urbo, i.a. per pakaĵo de akenaj bombonoj al la sinjorinoj. Posttagmeze oni vizitis la kuracejan ĝardenon "Neues Kurhaus", kie orkestro faris koncerton, dum la partoprenantoj refreŝiĝis diversmaniere. Vespere per trajno al Kolonjo.

Lundo komenciĝis per trajnveturo al Bingen, de kie oni ŝipiris laŭ rivero Rejno returne al Kolonjo. Oni povis komforte admiri la belan valon, kiu malvolviĝis antaŭ la okuloj, kaj precipe la unuan parton nomitan "La Romantika Rejno" kun siaj malnovaj kasteloj starantaj sur montetoj. Mardon matene okazis aŭtobusekskurso en la diversaj kvartaloj de Kolonjo, modernaj kaj malmalmodernaj. La urbo multe suferis de la milito, sed multaj rekonstruaĵoj estas jam faritaj en pli moderna stilo. Post adiaŭa komuna tagmanĝo la ekskursanoj disiĝis, sed konservos bonan kaj agrablan memoron pri la postkongreso de la 45-a.

Jean Oleffe

NORVEGA SOMERA SEMAJNO

7—14 aŭgusto 1960

La Orienta Distrikto de Norvega Esperantista Ligo por la unua fojo okazigis internacian ferian semajnon. La kadro estis la popola altlernejo, *Hundorp*, meze en Gudbrandsdalen, grandega valo en la koro de Norvegujo.

Ĉiun antaŭtagmezon okazis kurso sub lerta gvido de s-ino Astrid Mansrud. Prelegis i.a. lektoro Johan Hammond Rosbach (lumbildprezentado de originala serio "Akvo", kaj pri nia lingvouzo), pastoro Hans Amund Rosbach (lirike, pri fabelplena norda Norvegujo), arkitekto Knut Norrvall (uzo de mapo kaj kompasoj dum senvoja promeno) kaj instruisto Lars Kaare Hunnes (serĉado en la historio de Esperanto).

Merkrede la gekursanoj vizitis Aulestad, la konatan hejmon de la norvega poeto Bjørnstjerne Bjørnson, kiu mortis antaŭ 50 jaroj.

Organizis kaj gvidis la aranĝon Tharald Dybing.

Tra la Monda

Aŭstrujo

Pentekoste okazis en Vieno la Aŭstria Esperanto-Konferenco 1960, la ĉijara plej grava manifestacio de la Aŭstria Esperantistaro. Ĉirkaŭ 130 gesamideanoj el ĉiuj aŭstriaaj liglandoj kunvenis en bela restoracio salono Rakosch, kie antaŭ 53 jaroj estis fondita la unua Viena Esperantista Societo. Okazis laborkunveno, fakkunsidoj kaj salut-vespero. Dimanĉon matene okazis katolika Diservo kun esperantista prediko farita de s-ro franciskana pastro Pio Lenz el Klagenfurt. La 16-an ĝeneral-kunvenon de A.E.F. ĉeestis pli ol 100 gesamideanoj. Oni reelektis preskaŭ la saman estraron. Ĉeestis ankaŭ s-ro Dobčić el Ljubljana kaj s-ro prof. L. Laurat el Parizo. Lundo estis dediĉita al distroj kaj ekskursoj.

Britujo

Kvakera Esperantista Societo eldonis flavan kajeron pri William Penn — proponinto de eŭropa parlamento — de s-ro prof. Edmond Privat, represaĵo el "La Praktiko" de prelego prezentita dum la Internacia Somera Universitato ĉe la UK en Mainz, Germanujo, 1958.

Francujo

Jam estas kvazaŭ ĉiujara tradicio, ke la Esperanto-profesoro de la franca ŝtata radio "R.T.F.", s-ro Pierre Delaire, direktoro de la "Centre National Espéranto-Office", venas al Nederlando kun grupo konsistanta el liaj premiitaj lernantoj. (Kurso ĉe la radio, skriba kaj parola kursoj). La lernantoj ĉiam venas el diversaj partoj de Francujo, kaj eĉ venis ĉijare gasto el Belgujo, katolika pastro. Ĉiuj gastas senpage en esperantistaj familioj. Dum unu semajno la francaj gastoj kaj la belga pastro s-ro Frans Bastiaenen el Roeselare travivis kune kun s-ro Delaire mirindan semajnon en frata etoso. La ekskursoj en Amsterdam, Alkmaar, Volendam ktp. estis plensukcesaj, same kiel la adiaŭa festo, kiu faris grandan propagandon.



La foto montras la francan karavanon sur la tute nova "Beatrix-ponto". Maldekstre: S-roj Kuijt (del de UEA) kaj Delaire, kaj dekstre: S-ro pastro Bastiaenen.

Aperis en Francujo libro-klubo "Edelvejso".

Germanujo

La longjaraj klopodoj de la Esperanto-grupo Karlsruhe, ke la magistrato nomu novan straton "Zamenhofaŭ Esperanto-Strato" havis nun sukceson. La magistrato decidis en sia kunsido de la 28-a de junio 1960 doni al nova strato en la orienta parto de la urbo la nomon "Zamenhofstrato" por konservi la memoron al la fondinto de Esperanto.

Gronlando

Nun ankaŭ en la arktika regiono de Danlando, la insulo Gronlando, okazas instruado de Esperanto. Instruisto, s-ro Georg Kustos informis, ke li gvidas kurson en Godthåb. La kurson partoprenas i.a. pluraj instruistoj.

Hungarujo

Ĉe la ŝtat- kaj jurscienca fakao de la universitato "Lőránd Eötvös" en Budapeŝto la dekanato donis skriban permeson al studento, ke el du lingvoj devigaj li rajtas elekti Esperanton. La unua fremdlingvo estas la rusa. La studento devas montri ĉe la dekana oficejo ateston pri ekzameno en Esperanto, kian nun en Hungarlando donas la Ekzamena Komitato de la Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro.

★

Okaze de la Finn-ugra Kongreso en Budapeŝto s-ro Paul Ariste, membro de la Estona Scienca Akademio el Sovetunio, vizitis la kunvenon kaj faris paroladon i.a. pri la scienca uzo de la Internacia Lingvo. Hungara veterano s-ro A. O. Kelemen faris lumbildparoladon pri movado de la ĉielaj korpoj. Alia gasto estis prof. M. J. Ziomek el la pola urbo Katowice, kiu parolis pri la floranta pola movado kaj pri sia vojaĝo en Ĉinio antaŭ du jaroj.

★

En la poŝtista fakrondo s-ro Julio Baghy komencis elementan kaj progresantan kursojn, krome seminarion pri la esperantistaj verkistoj.

★

Oni instruas Esperanton en jenaj gimnazioj: en la gimnazio de Gyula, la gimnazio de Oreshaza 30 kaj la gimnazio Radnoti. Por instigi kaj apogi tiun ĉi laboron, oni estas petata sendi salutleterojn al la estontaj esperantistoj kaj al la direktoro de la koncernaj gimnazioj. Jen la adreso de "Radnoti": "Radnoti Miklos" Gimnázium, bulv Lenin n-o 6, SZEGED, Hungarujo.

★

Landa Junulara Renkontiĝo okazis en Budapeŝto la 20-an kaj 21-an de aŭgusto. Okazis ankaŭ sukcesaj ekzamenoj. Turka s-anino H. Verdia dum la kulturvespero prezentis turkan kanton en Esperanto. Oni povis ankaŭ aplaŭdi al s-ro Ferenc Jósika, kiu prezentis ne nur malnovajn kantojn, sed ankaŭ novan junularan grupon, la


artistan familion Kelen, kies plej aĝa junulo, Tibor Kelen nun fariĝis membro de la ŝtata opero. Lia arta, bela, ne ĉiutaga kantado de konataj arioj eksplodigis aplaŭdegon.

Madagaskaro

Nova Esperanto-kurso por komencantoj, organizita de la Esperantista Asocio de Madagaskaro, komenciĝis post vigla informado, la 15-an de oktobro en la Ĉambro de Komerco en Tananarivo. Ĉeestis 80 novaj lernantoj kaj 15 progresantoj. La redakcio de monata, loka revuo petis la Asocion aperigi kompletan kurson de Esperanto, en dek lecionoj en sia revuo. Delegitaro de E.A.M. la 17-an de oktobro estis akceptita de la urbestro, kaj prezentis al li peton, ke strato de la urbo ricevu la nomon de Zamenhof.

Pollando


La 29-a Internacia Foiro de Poznań, kiu okazis dum la lasta duono de junio ĉijare, inter sep aliaj lingvoj uzis ankaŭ Esperanton, kaj sur la areo de la foiro troviĝis por la unua fojo postmilita Esperanto-Informejo. Ankaŭ la foira radio preskaŭ ĉiutage dissendis seplingvan informon pri Esperanto kaj pri la informejo. Dank' al la iniciatinto de tiu informejo, s-ro Czesław Piasecki, s-ro Jan Popławski (loka UEA-delegito), la ĉefa estraro de PEA, kaj ĝia prezidanto s-ro Rajski, kaj pro la mona subvencio, la funkciigo de la Esperanto-Informejo dum la foiro de Poznań estis sukcesplena kaj laŭcela. La Foiro Estraro kaj ĝia longjara direktoro s-ro Stefan Askanas ankaŭ meritas dankon pro la favora sinteno. Fine por ke la venonta jaro montriĝu al ni pli sukcesa, estas necese kaj ege dezirinde, ke multaj komercaj firmaoj kaj entreprenoj turnu sin en Esperanto al la Foiro Estraro petante informojn kaj ligante eventualajn kontaktojn kaj negocojn. Tial do tutmondaj esperantistoj, komercistoj kaj fabrikistoj: ni atendas vian afablan helpon! Jen la adreso: Zarząd Międzynarodowych Targów Poznańskich, Poznań, str Głogowska Nr. 14, Pollando.



La gvidanto de la Esperanto-Informejo s-ano Czesław Piasecki dum la deĵoro.



Gastojn amase alvenantajn por partopreni la 29-an Internacian Foiron de Poznań salutis ĉijare ankaŭ esperantlingva bonveno.



Por soleni la Zamenhof-Jaron la Urba Konsilantaro de Poznań decidis ĉijare nomi unu el la stratoj per la nomo de la kreinto de la Lingvo Internacia. Jen la nova stratŝildo pendigita en majo de la kuranta jaro.

Sovetio

En la Domo de Sciencistoj en Krasnodar okazis en septembro granda ekspozicio pri Esperanto. Lekcion donis multjara esperantisto s-ro V. T. Najdin, kiu partoprenis la 3-an tutruslandan kongreson de esperantistoj en 1921. Post la lekcio oni decidis organizi kurson en la Domo, havigi lekcion en la televido, okazigi letervesperon kaj Zamenhof-kunvenon en decembro, fari specialan stampilon por unutagaj kovertoj kaj poŝtmarkoj, kaj havi montrofenestrajn ekspoziciojn en la urbaj kinejoj.



La foto montras s-ron V. T. Najdin (maldekstre) apud unu el la standoj de la ekspozicio. (Foto de G. A. Galaganov).

ESPERANTISTA VIVO

Gefianĉiĝo

De Vries-Ruig. Anoncis sian gefianĉiĝon du aktivaj junaj esperantistoj nederlandaj, F-ino Romana de Vries kaj S-ro Kees Ruig, fondinto de "M.E.R.I.-Marrondo" kaj redaktoro de "La Megafono".

Naskiĝo

Giloteaux. Ges-roj Lilli kaj Lucien Giloteaux, 7 Rue Saint-Saëns, Wattrelos, sciigas pri la naskiĝo de sia filino Nicole la 11-an de junio 1960.

Brink. Ges-roj L. Dirk Brink, antaŭe en Los Angeles, nun en Honkong, plezure anoncas la alvenon de la filo Michael John la 23-an de majo 1960.

Geedziĝo


Royer-Blanchard. F-ino Michèle Blanchard kaj s-ro Pierre Royer geedziĝis la 18-an de junio 1960 en Clamart (Seine), Francujo.

Al ĉiuj koran gratulon.

NEDERLANDO

La Nederlanda Asocio Esperantista "La Estonto Estas Nia" intencas organizi samspekan prelegsemajnon kiel jam plurfoje okazis en Frostavallen. Estas la intenco organizi ĝin antaŭ aŭ post la UK en Harrogate en 1961. Sed L.E.E.N. deziras havi impreson pri la interesiĝo kaj tial ĝi demandas al eksterlandaj esperantistoj: Ĉu vi principe deziras partopreni en tia preleg-semajno? Surbaze de la respondoj ĝi tuj ekagos kaj pretigos prospekton enhavantan la necesajn detalojn pri loko, kostoj, ktp. Interesiĝantoj bonvolu skribi al: E. de Wolf, Joh. de Breukstraat 18, Haarlem, Nederlando.

DANLANDO



24 gelernantoj 14-jaraj de s-ro Poul Thorsen, Randersgade skole, Kopenhago Ø, eklernis Esperanton en la deviga lecionaro kiel oficiala eksperimento. Le celo estas pruvi la praktikan valoron de la Internacia Lingvo en la geografia instruado. Ekstereŭropaj kolegoj estas petataj interligi siajn klasojn kun tiu de s-ro Thorsen.

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.
Por tempoj kaj ondlongoj vidu la oktobran numeron.

Radio Roma. 2-XII, Tra Romo: Kastelo Sankta Anĝelo; 6-XII, Novaĵoj el Italujo; 9-XII, Leterkesto kaj bibliografio; 13-XII, Tra la literaturo; 16-XII, Itala belarta urbo Lecce; 20-XII, La sanktulino de la stevardinoj: S. Bona el Pisa; 23-XII, "Kristnasko", sankta himno de A. Manzoni; 27-XII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 30-XII, Alia jaro pasis. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 1-XII, Signifo de la Tago de Respubliko por la jugoslaviaj popoloj; 8-XII, Recenzoj pri la novaj libroj; 15-XII, Honore al la Zamenhofa tago kaj la tago de Homaj Rajtoj; 22-XII, Memore al Frederiko Chopin, 29-XII, Novaĵoj el la movado kaj respondoj al korespondantoj.

EKŜPARU POR TOKIO ĈE U.E.A.!
Petu informojn ĉe la Centra Oficejo



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Ivo Osibov
Sinjskih Žrtava 13/II, Split, Jugoslavio

LA ROLO DE TEJO KAJ LA JUNULARAJ GRUPOJ EN LA LERNEJA KAMPANJO

Foje dum mi estis la sekretario de la Kroatia Esperanto-Ligo en Zagreb, venis al mi funkciulino el la Asocio "Niaj Infanoj". Ŝi petis, ke mi traduku esperantlingvan leteron ricevitan el eksterlando. Tiam mi eksciis, ke la multmembra asocio zorganta pri la infanoj publikigis anoncon en Esperanta gazeto proponante interŝanĝon de folkloraj pupoj-ludiloj kun eksterlandaj lernejoj kaj institucioj. Kaj mi tenis la unuan kaj la solan leteron, kiu venis post pli ol unu jaro (eĉ ĝin skribis senokupa malsanulo). La virino faris nenian rimarkigon. Sed mi pensis: kian opinion havos tiu grava asocio pri Esperanto, pri ĝia disvastigiteco kaj pri la organizaĵoj ĝin uzantaj?

Kiomfoje oni trovas nenian reeĥon je similaj anoncoj kaj petoj! Kiomfoje ni preterlasas bonegan ŝancon por pruvi al la ekstera publiko la taŭgecon kaj la veran internaciecon de la Internacia Lingvo! Mi scias pri pluraj lernejaj grupoj, kiuj volis kontakti eksterlandajn lernejojn, sed sensukcese. Mi scias, ke kelkaj lernejoj kiuj volis partopreni en rondo "Grajnoj en Vento" ne sukcesis en tio, ĉar ili ne trovis interesatojn eksterlande. Tio devas nin pensigi! Oni taksas, ke Esperanto estas instruata en proksimume 300 lernejoj de la mondo. Eĉ la eblojn, kiujn donas tiu absolute modesta nombro, ni ne ekspluatas.

La Varsovia Rezolucio iniciatis novan, pli intensan internaciskalan lernejan kampanjon. La ĉijara Internacia Pedagogia Semajno en Jugoslavio detale diskutis la rolon de la Esperanto-organizaĵoj, instruistaro kaj junularo en la lerneja laboro. Fine la Kongresa Rezolucio de Bruselo rekomendis, interalie, al TEJO konsideri la proponojn de la Internacia Pedagogia Semajno, kiom tiuj proponoj ĝin koncernas.

Jam estas konstatite, ke ni ne agas sufiĉe internacie kaj kunordigite. Tia manko estas ege grava en internacia movado, kia estas la nia. Esperanto certe havas ankaŭ pedagogian valoron. Sed ĝian instruadon en la lernejoj de la hodiaŭa mondo povas pravigi nur ĝia uzebleco en internaciaj rilatoj, ĝia helpo al plivastigo de la horizonto de lernantoj kaj per tio ĝia kontribuo al la interkompreniĝo kaj starigo de humanismaj rilatoj inter la homoj. Paralele kun la vastigo de la instruado

ni klopodu ebligi al la gelernantoj plejeble larĝan utiligon de la nova lingvoscio. Ni devas organizi kaj subteni intensan interŝanĝon de lerniloj, infanaj laboraĵoj, ludiloj, korespondadon inter la lernejoj, ktp. Kial ni ne imitu, aŭ pli bone, progresigu la laboron de diversformaj kluboj por internacia kunlaboro aŭ por UNO, kiuj jam ekzistas en la lernejoj dise tra la mondo? Ni tiel helpos plej bone al la ĝenerala instruado en diversaj landoj. Oni ne devas kredi al niaj vortoj, asertoj, statistikoj pri praktikeco kaj faileco de Esperanto. Al konkretaj rezultoj oni nepre kredos.

Por fari ĉion ĉi la sola instruisto estas senhelpa. Samtempe kun li, aŭ tuj post li en la lernejojn devas veni la organizo. Ĝi helpu al la instruisto transprenante de li la tutan laboron neligitan strikte al la lingvoinstruado. Jen la vasta agadkampo por TEJO kaj la junularaj organizaĵoj. Ili igu ĝin fekunda kaj la ĝerموj baldaŭ montriĝos. Tiam ni ne devos plendi, ĉar ni ne trovos reeĥon post niaj alvokoj, tiam ni pli rapide eniros la lernejojn.

Ĉiun tiusenkan kontribuadon pri sukcesoj kaj problemoj ni kun ĝojo salutos sur la kolonoj de nia rubriko.

Ivo Osibov

STUDENTOJ KUNVENAS EN LUND

La vaste fama universitato de Lund (Svedujo) havas kelkajn tre laŭdindajn tradiciojn. Unu el ili povas esti nomata la "Internacia Kurso", kiu estas farata ĉiun jaron dum du semajnoj, celante kontakton inter studentoj de ĉiuj landoj speciale sur soci-politika tereno.

Por ĉi tio Svedujo ofertas apartajn avantaĝojn: la neŭtrala sendependa politiko kaj publika opinio de la lando; krome la ekonomia bonfarto, kiu efektiviĝas en granda subvencio de la Rotarimovado kaj de la registaro, tiel ke ĝojiga plimulto de la partoprenantoj povas akiri stipendion. La temo de la ĉi-jara kurso, kiu fariĝas en la angla lingvo, estis: "La intelektulo en la socio". Ĝi estis fundo, el kiu floriĝis plej interesaj kaj vere edukivaj diskutoj, plejparte politikaj. La edukan valoron garantiis la ĉeesto de studentoj el 34 nacioj, inter kiuj multaj Afrikanoj kaj Azianoj, kaj ankaŭ komunistoj. Vi povas imagi, ke en tia medio informado pri Esperanto estas tre efika, ĉar oni ege konscias pri la graveco de libera komunikado. Estus dezirinde, ke venontjare ĉeestu pliaj studentoj esperantistoj, ĉar mi konstatis, ke la grundo en Lund estas

fekunda je la internaci-lingva ideo.

Kondiĉo tamen estas, ke oni vere tre bone konas la anglan. Vi sciis ankaŭ, ke la distra parto de la "Kurso" estas tre konsista kaj ke la sveda ĉarmo estas agrable invitema! Se vi ŝatas renkontiĝon en la skizita medio la proksiman jaron (fino de aŭgusto de 1961), bonvolu jam nun skribi al s-ro Ole Olsson, Bantorget 3, Lund, Svedujo. Komprenu bone, ke ne gravas, kiun fakon vi studas, aŭ ĉu vi havas scion pri la koncerna — ankoraŭ nekonata — temo de la "Internacia Kurso 1961". Bonvenon al Svedujo!

Johan Derks

LA ZAMENHOFA RENKONTIĜO DE JEB

La Junularo Esperantista Brita aranĝos ankaŭ ĉijare Zamenhofan renkontiĝon. Pasintjare ĝi okazis en Londono, dum ĉijare ĝin akceptos la ĉarma urbeto Lostwithiel en Cornwall (Sudokcidenta Anglujo). De la vespero de la 15-a de Decembro ĝis la mateno de la 19-a de Decembro malvolviĝos interesa programo, kiu inkluzivos ekskursojn, prelegojn, diservojn, ktp. Detalojn oni povas ekscii de S-ro H. R. Tonkin, St. John's College, Cambridge, Anglujo.

GEJUNULOJ - GESKOLTOJ

Venontsomere vi — kaj nia movado — havos unikan eblecon. Se ni uzos la eblecon, ni helpos oficialigi Esperanton inter norvegaj skoltaj.

La skolta distrikto "Nord-Østerdal" aranĝos ĵamboreeton ĉe la lago Femunden, apud la mineja urbeto Røros. Al tiu ĵamboreeto, kies kunaranganto estas la sveda distrikto "Staffan", venos grandskale svedaj kaj norvegaj geskoltoj, kaj danaj kaj finnaj skoltaj estas invitataj. Samtempe la distrikto oficiale subtenas la inviton al ĉiuj landaj esperantistaj geskoltoj. Du el la skoltaj gvidantoj, unu sveda kaj unu norvega, estas aktivaj esperantistoj, kaj partoprenos la ĵamboreeton, kaj inter la skoltaj de Nord-Østerdal ni ĉivintre aranĝos skriban, skoltan Esperanto-kurson.

Do, se vi deziras kaj povas uzi vian ferion en la altmontaro de la 25-a de junio ĝis la 2-a de julio 1961, vi estas bonvena. Se vi emas partopreni, sed ne estas skolto, fariĝu skolto, kaj ambaŭ movadoj profitos.

Skribu al Curt Bohmann, Fack 7, HÖGEN, Svedujo, aŭ al Hans Amund Rosbach, FOLLDAL, Norvegujo pri pliaj informoj.

Sed: Ju pli rapide ni havos certan scion pri esperantista partopreno, des pli forta estos nia propagando inter "niaj" skoltaj. Kaj — faru ĉion, ke ĉiu juna esperantisto scios pri la ĵamboreeto.

Hans Amund Rosbach



46-a Universala Kongreso de Esperanto

Harrogate 5.VIII - 12.VIII 1961 Britujo

D-ro Ferenc Szilágyi
65-jara

Korespondadreso: 46-a Universala Kongreso de Esperanto - Harrogate.
Telegrafo: Esperanto Harrogate.
Banko: Midland Bank Ltd. Harrogate.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 2 novembro 1960

Glumarkoj:

La Loka Kongresa Komitato eldonis kvarkoloran glumarkon kun emblemo de la 46-a Universala Kongreso. La glumarkoj estas aĉeteblaj ĉe la Kongresaj Perantoj, ĉe la Libro-Servoj kaj Landaj Asocioj, ĉe U.E.A. kaj ĉe la Kongresa Oficejo en Harrogate je prezo de po 1 ŝilingo kaj 6 pencoj por folio de 25 markoj.

Baza artikolo:

Baza artikolo pri la kongresa urbo kun enciklopediaj notoj pri Britujo estas senpage havebla — por inform-vesperoj ĉe lokaj societoj — rekte de la Kongresa Oficejo.

Sonbendo:

Lokaj Esperanto-societoj, regule aliĝintaj al Landaj Asocioj, povas senpage ricevi de la Kongresa Oficejo 30-minutan sonbendon por grupaj vesperoj. La sonbendo enhavas intervjuon kun la Prezidanto de L.K.K., paroladon de la Generala Sekretario de U.E.A., alvokon de esperantista infano kaj muzikan programon.

Fakaj kunvenoj:

Fakaj asocioj, dezirantaj okazigi fakajn kunvenojn dum la Universala Kongreso, estas petataj informi pri tio la Kongresan Komitaton ĝis la 31-a de decembro 1960.

Senpagaj partoprenoj:

Esperanto-Societoj, kiuj premie disponigas senpagajn partoprenojn en la Universala Kongreso al gajnintoj de lokaj konkursoj, estas petataj anonci sin ĉe la Kongresa Oficejo en Harrogate.

T.E.J.O.-Kongreso:

La Estraro de T.E.J.O. informas, ke kontraŭe al la antaŭa anonco la 17-a T.E.J.O.-Kongreso okazos en Wokingham (Britujo) de la 12-a ĝis la 19-a de aŭgusto 1961.

Antaŭkongreso:

Samtempe kun la Seminario "Oriento", okazos en Londono de la 2-a ĝis la 4-a de aŭgusto 1961 la oficiala Antaŭkongreso, sub aŭspicioj de U.E.A. kaj de la Londona Klubo.

Honora Protektanto:

Lordo Boyd Orr, Nobel-pacpremiito, akceptis esti la Alta Protektanto de la 46-a Universala Kongreso de Esperanto.

Statistiko:

(ĝis fino de oktobro): Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 9, Brazilo 4, Britujo 83, Bulgarujo 2, Danlando 5, Finnlando 3, Francujo 26, Germanujo 10, Hispanujo 2, Hungarujo 1, Irlando 1, Israelo 3, Italujo 7, Japanujo 2, Jugoslavio 12, Monako 4, Nederlando 7, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 3, Svedujo 13, Svisujo 5, Usono 1. (Entute 215 el 26 landoj. Pasintjare 174 el 28 landoj).

G. C. Fighiera,
Konstanta Kongresa Sekretario

En tiu ĉi jaro la konata redaktoro de "Norda Prismo" — unu el la plej bonaj Esperantlingvaj revuoj — fariĝis 65-jara. De tiu ĉi loko ni kore gratulas ĉi tiun meritplenan kaj talentan verkiston kaj ĵurnaliston. Por prilumilian karieron ni publikigas ĉi tie raporton pri literatura vespero okazinta en Budapeŝto je lia honoro:

La "Konkordo" Esperanto-Rondo en Budapeŝto aranĝis la 6-an de junio literaturan vesperon pri la vivo kaj verkado de d-ro Ferenc Szilágyi, kiu en la nuna jaro fariĝis 65-jara. Pri lia vivovojo, agado, poemoj kaj noveloj, pri lia eminenta laboro kiel publicisto — precipe depost kvin jaroj ĉe NORDA PRISMO — sinsekve parolis d-ro Kalocsay, Balkányi, prof. L. Kökény, Halka kaj Baghy, liaj iamaj kunlaborantoj en la hungara movado, ĉe Literatura Mondo, ĉe la Enciklopedio. Oni prezentis ankaŭ el liaj verkoj kaj tradukoj, kaj M. Sárosi ĉarmigis la vesperon per gitarluda kantado laŭ propraj melodioj, inter kiuj la "Skercon" de Szilágyi. Szilágyi fariĝis esperantisto en 1924, komencis agadi en la laborista movado kaj poste ankaŭ en la Hungarlanda Societo, precipe gvidante kursojn, verkante en gazetoj. Li estis ankaŭ sekretario de hungara literatura societo. Antaŭ 28 jaroj li forlasis pro la tiutempaj ekonomiaj cirkonstancoj sian patrujon kaj de tiu tempo nelacigeble ofertas sian laborforton en Svedujo por la movado. Antaŭ 25 jaroj aperis lia novmetoda interesa gramatiko, kiu atingis eldonojn en diversaj lingvoj. El liaj interesaj, ofte spritaj, kolorriĉaj rakontoj kun eleganta kaj moderna stilo kelkaj povus — kiel diris d-ro Kalocsay — fiera aparteni al iu ajn nacia literaturo. La ĉeestantoj de la altnivela kaj sukcesa vespero sendis komunan leter-saluton al sia forestanta amata amiko.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1960

Stato je la 31-a de oktobro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	2470	2860	115.79
2.	Nederlando	5093	5361	105.26
3.	Usono	3430	3610	105.25
4.	Belgujo	1985	2071	104.33
5.	Svislando	2075	2115	101.93
6.	Francujo	7111	7221	101.55
7.	Britujo	6566	6655	101.36
8.	Finnlando	2515	2400	95.43
9.	Germanujo	7450	7045	94.56
10.	Svedujo	6605	6180	93.57
11.	Norvegujo	2035	1878	92.29
12.	Hispanujo	2837	2535	89.35
13.	Danlando	2921	2490	85.24

14.	Italujo	4469	3800	85.03
15.	Brazilo	8260	4097	49.60
16.	Jugoslavio	7155	3430	47.94

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Argentino	815	940	115.34
2.	Aŭstrujo	1425	1570	110.18
3.	Kanado	615	665	108.13
4.	Aŭstralio	1076	1136	105.58
5.	Sudafriko	250	255	102.—
6.	Novzelando	989	965	97.57
7.	Israelo	250	240	96.—
8.	Portugalujo	575	535	93.04
9.	Urugvajo	255	230	90.20
10.	Madagaskaro	250	212	84.80
11.	Islando	270	205	75.93
12.	Maroko	256	190	74.22

Novaj Libroj

Duope ricevitaĵoj ni recenzas; unuope ricevitaĵoj ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

SEKELJ OKCIDENTE KAJ ORIENTE

Tibor Sekelj: TEMPESTO SUPER AKONKAGVO. Eld. Serbia Esperanto-Ligo, Beograd, 230 paĝoj. Bindita kaj broŝurita. Prezoj: Bind. 8.- gld., 32 steloj; broŝ. bona papero 7.- gld., 28 steloj; broŝ. simpla papero 6.- gld., 24 steloj.*

Tibor Sekelj: NEPALO MALFERMAS LA PORDON. Kun postparolo-leksikologia komentario de J. Régulo-Pérez. Eld. STAFETO, La Laguna, 1959. Popularscienca eldonserio n-ro 2. 216 paĝoj. Broŝ. Prezo: 12.- gld., 48 steloj.*

Kiam Serbia Esperanto-Ligo volis honore al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof eldoni libron, ĝi elektis — kaj prave — libron de Tibor Sekelj. Ni ĉiam sentis mankon de libroj el la plumo de Sekelj, des pli ĉar ni sciis ne nur, ke li estas perfekta esperantisto scio-plena, sed ankaŭ, ke li estas aktiva kaj produktema verkisto — en la serbokroata kaj hispana lingvoj. Kelkaj el la libroj jam aperis tradukite en deko da lingvoj.

Sekelj jam verkis libreton en Esperanto, sed kiam li nun definitive — t.e. por ĉiama ĝojo de la esperantista leganta publiko — eniras la Esperantan literaturan mondon, tio estas — per traduko; tiel liaj verkoj konkeris unu plian tradukan lingvon.

"Tempesto super Akonkagvo" estas originale verkita en la hispana lingvo, kaj aperis en pluraj aliaj. Kvankam la tradukinto, Hugo E. Garrote, faris bonan laboron — cetere reviziitan kaj de la aŭtoro mem kaj de la Esperanto-Instituto en Beograd — oni iom bedaŭras, ke ne ankaŭ la Esperanta lingvaĵo de la libro estas tiu de Sekelj mem, ĉar lia lingvaĵo posedas pli da vervo kaj suko.

Oni scias, ke Tibor Sekelj en Argentino estas konsiderata speciala heroo. Leginte la libron pri la konkero de Akonkagvo — kiom ajn modesta estas la prezentado de la persono Sekelj — oni komprenas kial. Dufoje li konkeris la pinton de la plej alta monto en Ameriko — ne kiel militkonkeranto plantanta sian flagon en la malamika teritorio, nek kiel esplorvojaĝisto, kiu glorigas sian landon per hisado de la nacia flago en nekonata

teritorio, — lia grupo hisis la argentinan flagon — kaj Sekelj aldonis la Esperantan. Kun streĉita intereso oni eklegas, legas kaj legadas — kaj nur malfacile povas formeti la treege interesan kaj emociplenan libron antaŭ la finlego.

La eldonkvanto estas nur 3000, kio signifas, ke eĉ ne ĉiu deka esperantisto povos posedi la libron, kiu cetere estas eldonita je tri diversaj kvalitoj kaj prezoj: unu bindita, sur bona papero, alia broŝurita, sur bona papero, kaj la tria kategorio broŝurita, sur mezkvalita papero (kio signifas, almenaŭ en la paperproduktantaj landoj: Malbona papero).

"Nepalo malfermas la pordon" — kaj kiel tiu stranga lando malfermis siajn pordojn al Sekelj, tiel li per sia libro malfermas ĝiajn pordojn al ni. Ĉi tiu libro, kiu apartenas al la Popularscienca serio de STAFETO, estas originale verkita en Esperanto, sed jam antaŭ la apero estas tradukita en anglan, hispanan, serban kaj slovenan lingvojn — kaj meritas tradukon en ĉiujn aliajn lingvojn.

La landoj ĉirkaŭ Himalajo ĝuis lastatempe grandan aktualecon — sed ĝuis ne estas la adekvata vorto. Ĉiu legis en la gazetoj, kaj plimalpli eksciis pri tiuj regionoj kaj popoloj. Sed kiam la eldonisto deziras ke la libro estu recenzata de homo "bone informita pri la afero", mi devas konfesi, ke la mankoj estis grandaj, — sed ja aldoni, ke post legado de la libro de Sekelj, oni ne povas ne esti bone informita pri la afero!

Ĝuste nun la nepala reĝo Mahendra — el la libro de Sekelj mi lernis lian tutan titolon kaj nomon: Ŝri Panĉ Maharaĝadiraĝ Mahendra Bir Bikram Ŝah Devo — vizitas Eŭropon, kaj kvaŝaŭ proksimigas la foran, misteroplenan landon, vivigante personon, kiun ni renkontas en la libro, kaj kiun Sekelj renkontis en aŭdienco.

Oni rimarkas, ke Sekelj ne estas ordinara turistoj, sed ke li estas sciema kaj observema, ke li faras inteligentajn konkludojn kaj ke li bone memoras, kion li lernis. Tiel li estas modela verkisto de vojaĝpriskriboj — kaj liaj vojaĝpriskriboj donas al la leganto ne nur la streĉon de interesaj aven-

turoj, sed ankaŭ ekrigardon al historio, arto, religio, moroj, etnografio. Pli da rekomendoj ne estas necesaj, ĉar ĉio en la libro donas solidan impreson.

Malferminte la libron, oni tuj trovas mapon pri la koncerna lando, sed sur la mapo ĝi subite nomiĝas *Nepalujo* — kial? Same: kial *Tibetujo*? Ĉu ne *Tibeto* kaj *tibetano* estas internaciaj formoj?

Papero kaj prezentiĝo de la nepala libro estas bonaj, kiel ĉiam ĉe STAFETO, — enhavo kaj stilo estas altkvalitaj, kiel ĉiam ĉe Sekelj. Cetere la bildoj, el kiuj pluraj koloraj kaj sur aparte bona papero, estas bonaj, kaj ne nur beligas la libron, sed ankaŭ kompletigas la tre interesan bildon, kiun donas al ni la aŭtoro per sia rakonto pri Nepalo.

Johan Hammond Rosbach

TOM KAJ TINA. Internacia Esperanto-Lernolibro por Infanoj de Ole Nederland. Dansk Esperanto-Forlag, Åbyhøj. 46 paĝoj. Prezo: 13,20 st., 3,30 gld. Instrukcia libro 4,80 st. gld.*

Esperanto en la lernejo estas unu el la plej gravaj problemoj de nia tempo. La universala kongreso en Bruselo pritraktis ĝin en la unua sekcio. La dua internacia pedagogia semajno en Bohinj (sub la aŭspicioj de UEA kaj la Jugoslavia Unesco-Komisiono) ankaŭ penetris la diversajn demandojn tiurilate. Ĉiu esperantisto devas streĉi siajn fortojn por kontribui al la solvo de la problemoj. Tion oni povas fari diversmaniere ekz. helpante la instruistojn pri interŝanĝo de ĉiuspeca instru-materio (letero, ilustritaj poŝtkarto, projektoj, lumbildoj, sonbendoj ktp.) Sed unu tasko estas precipe instruista: ellaborado de interesaj kaj modernaj lernolibroj kaj legolibroj.

Antaŭ 15 jaroj la svedoj ricevis lernolibron en Esperanto por la lernejo de Einar Dahl. Nun la tutmonda instruistaro havas internacian Esperanto-lernolibron por infanoj "Tom kaj Tina" de la eminenta dana lingvoinstruisto Ole Nederland.

Jam la eksteraĵo kun la ruĝa koloro kaj la infanece desegnitaj bildoj de Tom kaj Tina allogas la infanojn. Ankaŭ en la teksto estas multaj klarigaj desegnaĵoj (kelkaj eble povus esti pli grandaj). Tipografie la libro estas bona: presita per grandaj kaj klaraj tipoj. La teksto estas facila kaj enhavas ĉ. 300 ĉiutagajn vortojn. Ili estas praktike ordigitaj en listo fine de la libro. La lernanto mem skribas la nacilingvan tradukon sur la paĝo, kie la vorto unufoje aperas. Streĉe interesa estas la malgranda detektivhistorio pri la rabisto.

Pri Tom kaj Tina mi esperas, ke ili havos multajn amikojn en la tuta mondo. Tion ili vere meritas.

Olle Olsson

Belartaj Konkursoj 1960

B r a n ĉ o : Originala prozo

Unua Premio

LA KOMISIO

Novelo

Albert Samijn

1

Eksaltante en la lito, Paŭlo abrupte vekiĝis. Tra la rompitaĵoj de ĥaosa premsonĝo, li aŭdis la akran voĉon de la patrino malsupre de la ŝtuparo. — "Hej, vekiĝu, Paŭlo! Dormemulo, ĉu mi devas tiri vin el sub la litotukoj?" — Konfuzite kaj duondorme li gratis la jukantajn harojn. Plenaj de petolaj polvoj, la sunradioj prilumis la malnovan vekhorloĝon. Ĝi indikis duonon post la sepa. Ĉu ĝi haltis? — Ne, regule kaj pacience ĝi fortiktakis la sekundojn de l' ĉambra silento.

— "Sed, panjo, estas apenaŭ la sepa kaj duono! Kaj hodiaŭ mi havas libertempon, vi sciuj!"

— "Mi scias. Sed vi devas fari komision. Tre urĝe! Ellitiĝu tuj!"

— "Bone, mi venos," li rezignis.

En la banĉambro li profunde enpensiĝis, dum li vigle lavis sin. — Komisio! Kia komisio? Li ne komprenis. Nur pecoj de rememoro trafumis lian cerbon. Hieraŭ li festis sian 16-jaran naskiĝtagon. Je lia honoro okazis gaja festeno en familia rondo kun la gepatroj, Ann, lia 18-jara fratino, la ĝemelaj fratetoj Raf kaj Robi, kelkaj invititoj, geamikoj de Ann kaj li, kaj Helga, la brunokula, beleta, samaĝa najbarino. Ek de la posttagmezo ĝis malfrue en la nokto ili manĝis kaj trinkis, muzikis kaj dancis. Feliĉa kaj iom ebrieta li ĝuis kaj en sia triumfo sentante sin plenaĝa kaj vira, li eĉ kuraĝe okulumis al Helga, kiu kelkfoje per vualita rideto respondis. Ŝajnis al li, ke Ann jam delonge suspektis la idilion kaj pro tio moke deturnis la kapon, kiam ĉe l'eniĝo kaj laŭ kutimo en tiaj okazoj, Helga trifoje kisis lin. Kvankam ŝiaj lipoj apenaŭ ektuŝis liajn vangojn, li retenis sian spiron, liaj manoj tremetis, lia buŝo estis tute seka kaj dum momento li ŝvebis malproksimen sur nuboj de knabina parfumo. Pli malfrue en la vespero li ĉirkaŭbrakis ŝin en la malluma verando; korpon ĉe korpo ili staris kaj li sentis la molan karnon vivi kontraŭ li; tiam, subite ŝi liberigis sin kaj forkuris ĉe la aliajn. Poste ŝi eĉ ne plu rigardis lin. Kiam je la unua nokte la gastoj reiris hejmen, li tuj enlitiĝis kaj ekdormis peze.

Tiel la festo, malgraŭ laŭtaj ridoj kaj kantoj, finiĝis iom malgaje por li kaj pro tio kulpis nur lia mallerta korpo etendanta sin en malĝusta direkto. Efektive, kiom ajn naturdotita per frumatura menso li estis, li tamen ne sufiĉe kreskis dum la jaroj, kaj malgranda de statur, grasvanga

kaj dikventra, aspektis iom buba. La kamaradoj tial primokis lin per kromnomo "bulbuleto". Kaŝe ĉagrenis lia fiero, altflugema spirito pro tiu korpulento, kiu kvazaŭ damnis ĝin al eterna, ĉetera vivo. Ho, kreski gracie, li ofte sopiris, kaj per korpo respegulanta la vastan animan elanon trakuri la urbon! Sed kion fari? — Elirinte la banĉambron, li malgraŭvole malsupreniris la ŝtuparon. Aĥ, ju pli alten la spirito aspiras, des pli malica la balasta korpo per malindaj mallertaĵoj karikaturas, profanas kaj perfidas ĝin.

— "Bonan matenon," li diris, enirante la familian ĉambron. La patro kaj Ann matenmanĝis, silente kaj rapide. Ili ĉiam foriris je la oka, ĉar ili laboris en la urba centro, li kiel bankoficisto, ŝi kiel tajpistino. Ili remurmuris saluton.

— "Jen", respondis la patrino apud la ŝranko kaj ŝi fingrofrapis ion. "Paketo de Profesoro Martin. Vi devas porti ĝin al domo de Ĝenerala Direktoro Vandekam, kiu donos respondon. Estas tre grave! Dokumentoj! Ĉu vi komprenas? Ne rigardu tiel idiote! Manĝu tuj kaj foriru. La Profesoro atendas."

Li altablighis, prenis buterpanon kaj trinkis kafon. — Nu, la afero ne estis tiel ĝena kaj enuiga, kiel li unue timis. Dum li trinkis la nigran kafon, lia cerbo plene klariĝis kaj li ree ekkonsciis pri la propra valoro. La komisio estis sendube grava, ĉar eĉ la patrino ne povis ne konsenti pri tio. Kaj lin la Profesoro elektis por fari ĝin! Jes, li, malŝatata bubo, funkcios hodiaŭ kiel ununura ĉenero inter du alte ŝatataj viroj, multe pli estimindaj ol la gepatroj mem. Neniam li aŭdis pri Ĝenerala Direktoro Vandekam, sed la belsonanta titolo sufiĉis por konvinki ĉiujn pri lia graveco. La Profesoro, pala, altkreska maljunulo kun longa, belega barbo, loĝis en griza, vasta domo, apude en la strato, kaj ĉiam ridetis ĝentile, kiam Paŭlo tre respektplene salutis lin. Antaŭ kelkaj monatoj li tamen grave malsaniĝis kaj ne plu forlasis la ĉambron. Sed la bela printempa vetero certe kuracos lin kaj de nun ili ne plu renkontos sin kiel duonfremduloj, sed kiel komisiinto kaj konfidito. Sub instigo de la entuziasmiĝinta animo, li riskis demandon:

— "Diru, panjo, ĉu vere la Profesoro petis, ke mi faru la komision?"

Ekridegis Ann tiel laŭte, ke ŝi misglutis kaj bruetis. Ankaŭ la patro grimacis, kvankam li ordonis ke Ann kvietiĝu. "Kia misedukiĝo!"

— "Stultulo," diris la patrino, "ĉu vi ambicias ja? Senluziĝu do. Servistino alportis la paketon kaj petis al mi, ke mi okupiĝu pri ĝi. Ŝi ne havas tempon, la Profesoro plimalŝanĝis dum la nokto. Obsedas lin ideo de iu aŭ alia pretigita raporto, mi ne precize scias, destinita al iu Vandekam, Ĝenerala Direktoro de l' A.Z.-trusto. Hieraŭ oni telefonis al li. Li promesis, ke li donos tujan respondon, se li povas trarigardi la paperojn. Jen ili estas, en la paketo. Oni esperas, ke la respondo trankviligos la Profesoron. Mi pensis al vi por fari la komision, ĉar mi ne havas alian. Mi mem estas tre okupita ĉi-matene. Aŭ ĉu mi sendos la ĝemelejn? Kune ili ja havas vian aĝon! Vi eble estas inteligenta, mia knabo, sed mi ne fidus al vi. Vi tro fieras en la animo. Estas malbone. Kaj jen la kaŭzo de viaj senĉesaj mallertaĵoj. Vere, mi dubas ĉu vi konvenas...."

— "Certe li konvenas, patrino," mokis Ann perfide, "la eksteraĵo trompas! Ekde hieraŭ li estas vira.... Kaj baldaŭ fianĉiĝos, ĉu ne, frateto? Mi bone rimarkis...."

Li krude interrompis ŝin per forta piedbato sur ŝiajn maleolojn. Humiligita kaj hontoplena li enĝlutis la panpecojn, ekstaris, surmetis veŝton kaj prenis la paketon. — "Nu, mi rapidos," li adiaŭis.

— "Estu tre ĝentila tie!" ankoraŭ admonis lin la patro, dum la pordo klakfermiĝis. — Finfine sola, li pensis sur la trotuaro. Feliĉe ke S-ro Ĝenerala Direktoro loĝas en suda antaŭurbo, tiel la turmentantoj almenaŭ ne povas akompani min. Kaj li ekĝemis. — Tia familio!

Banis sin la stratojn en sunlumo. En la avenuaĵoj arboj ekpepis birdoj, laŭdantaj la printempan varmon. — Se mi rapidas, li rezonadis, mi nur perdos malmultan tempon. Maksimume du horojn. Do se Helga volus, ni povus promeni posttagmeze en la arbaro aŭ en malproksima parko. Mi iru al ŝi. Malgraŭ ĉio mi firme kredas, ke ŝi ne estas indiferenta kontraŭ mi, tute ne! Sed mi atentis, Ann estas perfida klaĉulino. — El malfermita fenestro de etaĝa ĉambro eliĝis radiomuziko. Marŝante vigle al tramhaltejo, li iom pligajiĝis kaj ekfajfis frivolan arion, ridetante pro la ideo kiel la patro furiozus, se li aŭdus ĝin.

2.

Sur la tramo troviĝis nur kelkaj pasaĝeroj, kontraŭe al tiuj veturantoj al urbocentro. Malice li ekĝojis pro Ann, kiu ankaŭ veturis en tia troŝarĝita tramo kaj li esperis, ke ŝi sufokiĝu inter amaso da maljunaj viraĵoj. Intertempe li studis la adreson sur la paketo: Mimoza Avenuo, 13. — Kvartalo de modernaj vilaoj, li konsciis, milionuloj, kaj tuj senkuraĝiĝis. — Kiel ili akceptos min? Ho, se mi jam estus sur la returna vojo! — Sed kial? Pro kio tiel timema, hej? Oni ja informis ilin. Telefone. Mi nur prezentu la paketon kaj atendu la respondon. Mi estu pli praktika kaj agema!

Tramhaltejo! Li eliris sur larĝan, senliman bulvardon. Ambaŭflanke bruega aŭtotrafiko, turmentanta la orelojn. Iom senhelpe li serĉis Mimozan Avenuon, preteriris du, tri flankstratojn, finfine trovis ĝin. Tie, inter altaj heĝoj de imponaj bienoj, li profunde enspiris la freŝan aeron kaj kvietiĝis. Tra densa arboflaro brila suno promesis feliĉan plenumon de plej intimaj korsopiroj. — Ho, esti libera hodiaŭ kaj perdiĝi en radiantaj ĉielo de knabinaj okuloj! H.e.l.g.a.! Kiel petola alaŭdo ŝi ĉirkaŭflugetas lin, sed kiam liaj tremantaj manoj sin etendas, ŝi supreniĝas alten ĝis la laca, peziĝanta rigardo ne plu povas sekvi kaj terenfalas...

Numero 13 estis indikita sur fosto de barilpordo kun avertanta tabuleto: "Eniro malpermesata. Atentu la hundojn!" — Ie malproksime li efektive aŭdis ilian minacantan bojegadon. Li momenton hezitis, poste levis la ŝultrojn kaj sonigis. La vilaon li ne vidis; ĝi kaŝiĝis post densa parko de arboj kaj arbustoj. Pasis minutoj. Neniu venis. Nur la hundoj daŭrigis sian bojegadon, ŝajne pli forta. Krome, plena silento. Li ree sonigis, atendis, paŝis sencele tien kaj ree antaŭ la pordo. Neniu. Kion fari? Senespere li triafoje sonigis. Pasis kvaronhoro. Neniu. — "Nu," li diris al si, "ĉu eble mi estas tro frua? Sed oni ja telefonis ilin kaj ili konsentis. Malbenitaj, nefidindaj riĉuloj! Bone, mi faros etan ekskurson en la ĉirkaŭaĵo kaj revenos je la deka." Kolere li foriris.

Dek minutojn post la deka li revenis. Sonigis. Neniu. Iom nerve, duafoje sonigis. Neniu. Triafoje sonigis, longe kaj sovaĝe. Ĉio, krom la hundoj, trankvile plue dormetis. — Ĉu eble la sonorilo ne funkcias? Sed kiel li scios? — Kaj la pordo, ĉu ĝi estas ŝlosita? Li provis malfermi ĝin, kaj mirige, ĝi cedis. — Hm, ĉu mi riskos antaŭeniri ĝis la vilao, li pripensis. Verŝajne ne decas, sed mi ja ne povas perdi tutan tagon ĝis ili bonvolos eliri la vilaon. Mi estas komisiito kaj ili konsentis. Kaj Helga atendas min. — Tiu lasta ideo, kvankam pura fantaziaĵo, decidigis lin. Sed apenaŭ li faris du paŝojn kaj jen terurite retrokuris, tirfermante la pordon post si. Ĝustatempe! Du naŭzaj buldogoj kun brilaj dentoj saltis sur ĝin, skuante ĝin sub sia fortego. Bategis lia koro kaj li sentis sin tute varma. — Dio mia! li ekĝemis, ankoraŭ unu momenton kaj ili ĵetus sin sur min. Damne damnita Vandekam, li ne ŝlosas la barilpordon kaj tamen lasas siajn danĝerajn bestaĵojn libere kuri tra la bieno. Ho, kiel ĉio ĉi tio tendas min! — Senkuraĝe li eksidis teren antaŭ la heĝo kaj piedbatis sian paketon duonmetron for de si.

Daŭrigota

**Partoprenu en la
Internacia Arta Festivalo!**

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de novembro 1960

N-ro 332

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de oktobro kaj ankaŭ por komparo je la fino de oktobro 1959 :

	1959	1960
Asociaj membroj	16383	17261
Individuaj membroj		
MJ	857	833
MA	5335	5024
MS	516	564
Pat.	7	5
DM	338	354
HM	45	43
JMJ	28	29
JMA	182	188
	7308	7040
	23691	24301

DELEGITOJ

Australio

Albury (New South Wales) D : vakas.

Belgujo

Horseaux (Flandre Occidentale) D : vakas.

Bolivio

La Paz D : S-ro Magin Zubieta, inĝeniero, Casilla 963.

Brazilo

São Paulo (São Paulo) FD (Katolikismo) : F-ino Guiomar Aquino, ŝtata oficistino, Recebedoria Federal de São Paulo.

Britujo

London (England) FD (Medicino) : D-ro George Barasi, kuracisto; 45, Twyford Avenue.

Manchester FD (telefonio) : vakas.

Sutton (Surrey) FD (biciklado) : S-ro Michael Garnett, asekura oficisto, H. Cecil Road, Cheam.

Danlando

Gentofte (Sjælland) FD (juro) : S-ro Eskil Svane, ministeria sekretario, Lindegaardsvej 28 C, Charlottenlund.

København (Sjælland) FD (juro) : S-ro Terje Møllerup, advokato, 15 Puggårdsgade.

Finnlando

Turku (Turun ja Porin 1) FD (instruado) : S-ro Jorma Ahomäki, instruisto, Rauvolan koulu.

Francujo

Chaponost (Rhône) D : S-ro Henri Roy, kontisto.

FD (ekonomio) : la D.

FD (juro) : la D.

Dax (Landes) D : S-ino Simonne Combebias, Lotissement Larcebeau Route de Tercis.

Epernay (Marne) FD (fervojoj) : S-ro Serge Debar, fervojisto, 38, rue des Petits Prés.

Fécamp (Seine Maritime) D : S-ro Ernest Permanne, bilancisto, 9 Rue

St. Etienne.

VD : vakas.

Licques (Pas-de-Calais) D : S-ro Paul Poulain, farmaciisto, 44 Rue du Bourg.

FD (farmacio) : la D.

Hispanujo

Madrid FD (laboristaj aferoj) : vakas.

Italujo

Messina (Sicilio) FD (komerco) : S-ro Felice Miuccio, Via Piemonte 49 A.

Kanado

Lachute (Quebec) D : vakas.

Nov-Zelando

Auckland (Nov Zelando) FD (konstruado) : vakas.

Pollando

Poznań (Wielkopolska) FD (instruado) : S-ro Zbigniew Rosiak, instruisto, str. Rolna 5/3.

Ślupsk (Polska) FD (medicino) : D-ro Ludwik Zgierski, kuracisto, al. Poplawskiego 5a. m 7.

Sosnowiec FD (instruado) : Mag. Maria Jozefa Krausowa, profesorino, Rudna II, Zamenhofstrato 14/26.

Warszawa FD (Sindikatoj) : S-ro Aleksander Glybowski, ekonomiisto, Iwicka 19 m 52.

Portugalujo

Moscavide (Estremadura) FD (bestprotektado) : vakas.

Sovet-Unio

Abja-Paluoja (Estona SSR) D : S-ro Ants Mikk, bibliotekisto, Aia 12.

FD (ateismo scienca) : la D.

Lilli (Estona SSR) D : S-ro Herbert Järvalu, vendejestro, Abja rajoon.

FD (komerco) : la D.

Novo-Spasskoe (Kurska regiono) D : S-ro Dmitrij Zreliĥ, instruisto, st. Zolotuĥino.

FD (instruado) : la D.

Tallinn (Nõmme) VD : S-ro Johannes Palu, elektristo, Sõlme 21. (Kalinin regiono de la urbo).

VD : S-ro Voldemar Vitkin, ekonomiisto, Paldiski str. 3-53.

FD (filatelo) : S-ro Johannes Palu, elektristo, Sõlme 21.

FD (finanekonomio) : la VD (S-ro Vitkin).

FD (literatur-interŝanĝado) : La VD (S-ro Vitkin).

Svedujo

Karlskrona (Blekinge) JD : S-ro Jaan-Evert Aldsten, tekn. studento, Björkholmsplan 13.

Skövde (Västergötland) JD : F-ino Lillemor Strengh, Bl. 8036.

Ystad (Skåne) JD : S-ro Bertil Bondesson, N. Vallösa 4, Rynge.

Svislando

Horgen (Zürich) FD (kontraŭ-alkoholismo) : S-ro Hans Bickel, instruisto, Feldeggweg 7.

Konolfingen BE (Emmental) FD (fervojoj) : S-ro Erwin Hans Zuber, subĉefo, stacidomo.

FD (kontraŭ-alkoholismo) : la FD (fervojoj).

FD (stenografio) : la FD (fervojoj).

Langenthal (Bern) FD (tekstaĵoj) : F-ino Lilly Schaerer, oficistino, Schorenstrasse 32.

Seuzach (Zürich) D : S-ro Josef Seeger, korektisto, Oberwiesenstrasse 7.

Usono

Bay Shore (New York) D : S-ino Madeleine D'Estries, 1346 Gardiner Drive.

Eau Gallie (Floriada) D : S-ro William Pauling, teknikisto, P.O. Box 1225.

Escondido (California) VD : vakas.

Palo Alto (California) D : S-ro Chester Swienton, vendisto, 2524 Illinois St.

Roselawn (Indiana) FD (nudismo) : S-ro Alois S. Knapp, advokato.

San Francisco (California) FD (natu- rismo) : S-ro Leif Heilberg, maŝinil- laboristo, 447 Cole Street, San Francisco 17.

FD (nudismo) : S-ino Elisabeth Odette Heilberg sekretariino, 447 Cole Street.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Berry, F-ino C., Auckland, Nov- Zelando.

Brink, S-ro D.M., Hongkong.

Kersaudy, S-ro George, Bangkok, Tajlando.

Lapenna, S-ino Emilija, Zagreb, Jugo- slavio.

Medema, S-ro U., Zwolle, Nederlando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1960

552 Farias, S-ro Benedito Figueiredo, Feira de Santana, Bahia, Brazilo.

553 Gaio, S-ro Jorge Manoel, Rio de Janeiro, Brazilo.

554 Souza, S-ro Nelson Pereira de, Rio de Janeiro, Brazilo.

555 Nicholson, S-ro W.G., Lower Hutt, Nov-Zelando.

556 Julin, S-ro Teodor, Stockholm, Svedujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1961

1. Lamberts, S-ro Victor, Bruselo, Belgujo; 2. Andresen, S-ino Hillka- Liisa, Fredericia, 3. Andresen, S-ro Søren, Fredericia, 4. Ziegler, S-ro

Sven, Vanløse (København), Danlando; 5. Helfers, S-ro F., Karlsruhe (Baden), 6. Jaehn, S-ro Wilhelm, Düsseldorf, 7. Raab, S-ro Johann M., Nürnberg, Germanujo; 8. Boscarino, S-ro Adv. G. S., Ragusa, Italujo; 9. Gaucher, S-ro Jacques, Quebec 10, P. Q., Kanado; 10. Acosta, S-ro William Kings, Kostariko; 11. Allan, S-ro J. T., Wellington, 12. Pivac, S-ro G. L., Matamata, 13. Wiltshire, S-ro Arthur G., Auckland W 3, Nov-Zelando; 14. Andžans, S-ro Janis, Riga 12, 15. Cins, S-ro Solomons Iljičs, Riga, Sovet-Unio; 16. D'Estries S-ino Madeleine, Bay Shore, 17. Heilberg, S-reto Aleksander, San Francisco, 18. Heilberg, S-ino Elis, San Francisco, 19. Heilberg, S-ro Leif, San Francisco, 20. Hughes, S-ro Adrian, Hillsboro, Usono.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo: 18.387,56 gld.
S-ino L. E. Blacklock, Britujo, 10.58 gld.
N.E. Esp. Fed., Britujo, 28.51 gld.
S-ino Vincent, Francujo, 7.70 gld.
Entute 18434.35 gld. je 1.11.1960.
Daŭrigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio por firmigi la poziciojn akiritajn dum la Zamenhof-Jaro!

DONACIOJ AL A.P.O.

D-rino Rosa Scolnik, Argentino, gld. 14.20.
S-ro H. Mallett, Britujo, gld. 10.58.
S-ro K. Mc Lennon, Britujo, gld. 10.58.
S-ino Vincent, Francujo, gld. 7.70.
F-ino P. Oosthoek, Nederlando, gld. 3.—.

DONACIOJ AL ĜENERALA KASO

S-ro S. Andresen, Danlando, gld. 10.—.
Intersteno, Italujo, gld. 3.—.
S-ro A. N. de Kleine, Nederlando, gld. 4.40.
F-ino Helen T. Larson, Usono, gld. 4.71.
Al ĉiuj donancintoj tre koran dankon.
M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Mi korespondas kun ĉiu interesulo, precipe kun lingvano ne apartenanta al la hind-eŭropa lingvaro, pri: kio en E estas facila por vi, kio ne! Kio plaĉas al vi, kio ne! Ĉio rilate al strukturo, gramatiko, afiksaro, vortmaterialo kaj informado ktp. Atentu mian jubilean anoncon en jarlibro 1959, p. 332! H. Dresselhaus (Brockmann) en Schloss Holte, Westf., Germanujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Gasthuisstraat 68, Tilburg, Nederlando.

Belan frontispicon havas nova eldonaĵo 'William Penn'; majstra prelego de Prof. D-ro E. Privat. Eldonis Kvakera Esperantista Societo, Bath Road, Ventnor I.W., Anglujo. Prezo 3 resp. kup. aŭ 3 steloj.

Montru al ni vian landon sendante bildkarton por letervespero okazonta la 14-an de januaro 1961 por niaj gelnantoj (60). Instituto de Esperanto, Secretaría, Av. Gmo. Franco, 243, Barcelona 13 (Hispanujo). Dankrespondo certa!

Grava hispana gazeto pri konstruaĵoj, bezonas seriozajn gekorespondantojn por akiri fotojn de modernaj konstruaĵoj. Rekompencos aŭ ŝanĝos, laŭdezire. Respondo garantiata. S-ro Juan Farré, Avda. José Antonio, 432 Barcelona (15), Hispanujo.

Adresŝanĝo. Geamikoj de R.R. Bonesper (New York 36, Usono) notu lian novan adreson "Ralph R. Bonesper, 1793 Riverside Dr. 3-J, New York 34, N.Y."

Helpu ke oni eldonu esperantlingvan banlokan broŝuron: Mendu la jam ekzistantan nacilingvan kun Esperanto-aldono ĉe Mě. Národní Výbor, kulturní odd. (Urba nacia komitato, kultura fako). Teplice lázně v Č, Ĉeĥoslovakio.

Korespondi pri fotorevuoj, magazinoj kaj filmgazetoj hungaraj (ankaŭ eldonoj de 1958—1960) kun esperantist(in)oj deziras József Rácz, Bácska Topola, Somborska 40, Jugoslavio.

Aperis Fundamento de Intersteno, nova eldono (nur nova enkonduko!). Respondkupono aŭ pm. por eksterlanda afranko de letero aŭ 100 stam-pitaj pm. C. Daglio (delegito) Litta Parodi, Alessandria (Italujo).

Nur Interstene korespondas F. Miuccio, via Piemonte 48-A, Messina (Italujo). Lingvo: Esperanto.

Ĉiuj Vojoj kondukas al Dovro! Ostendo (pasaĝersipo kaj aŭtopramo), Dunkerque (vagonarpramo ankaŭ por pieduloj), Calais (pasaĝersipo kaj aŭtopramo), Bulonjo-sur-Mar (aŭtopramo). Eĉ se vi ne haltos, vin anoncu jam nun al D. Soleo, 14 B Castle Avenue, Dover.

En oktobro 1961 dum okazigo 17-a Brazila Kongreso de Esperanto, Organiza Komitato intencas aranĝi imponan Esp.-ekspozicion. Bonvolu sendi Esp.-revuojn, gazetojn, il. pk. adresitajn Av. Borges de Medeiros 929, ap. 82, Porte Alegre, Rio Grande do Sul, Brazilo.

Ĉio alloga, precipe ilustritaj poŝtkartoj (bele afrankitaj), revuoj, k.t.p. certigos ke baldaŭa ekspozicio varbos multajn novajn samideanojn. Klara adreso garantias belegan dankkarton. Sendu amase al: Esperato, Box 274, Christchurch, Novzelando.

Nova gramofondisko en Esperanto (17 cm), mikrokanela, nerompebla: "La Espero", "Ĉeriz' Tempo" (franca), "Al la Fontano Klara" (kanada), "Andiaŭ" el Schubert (germana). Kanto Marguerite Santreuil, Y. Mathy. En luksa koverto "verda" kun portreto de D-ro Zamenhof. La mendojn oni sendu al "Diskoj Oceana Pordo", 21 Str. Berne, Paris 8, Francujo. Poŝtkonto II 652-37. Paris.

BRILA EKZEMPLO

S-ro Albert Lienhardt, Delegito de U.E.A. en Mulhouse, Francujo, ĵus skribis al la Centra Oficejo:

"Antaŭ du-tri jaroj mi decidis depreni ĉiumonate unu centonon (do 1%) de mia salajro, kaj meti ĝin en specialan Esperanto-ŝparujon. Nun mi atingis sufiĉan sumon por fariĝi DUMVIVA MEMBRO de U.E.A., kaj hodiaŭ mi havas la ĝojon ĝiri ĝin al via konto ĉe U.E.F. en Parizo.

Se tiu simpla rimedo por fariĝi dumviva membro de U.E.A. kaj, samtempe, por doni efikan sub-

tenon al nia movado, povus instigi ankaŭ ALIAJN gesamideanojn agi simile, mia ĝojo multobligus proporcie al la nombro da novaj 'dumvivuloj'."

De ĉi tiu loko ni ankoraŭfoje esprimas nian koran dankon al S-ro Lienhardt pro lia bonega iniciato kaj brila ekzemplo kaj ni povas nur rekomendi al ĉiuj fidelaj membroj imiti lin.

Ni speciale atentigas, ke ĝis la 31-a de decembro 1960 validas ankoraŭ la *malnova* kotizo DM (250,— gld., 1000 steloj, aŭ egalvaloro).

Dir. C. O.

ĈU VI DEZIRAS
HELPI NIAJN
OFICEJAJN LABOROJN ?



Frue pagu vian kotizon 1961!

(konsultante la kotiztabelon en la oktobra numero)

ĈU VI DEZIRAS HELPI U.E.A. ?

FARIĜU DUMVIVA MEMBRO

LASTA MEMORIGO AL LA GRUPOJ!

**Sendu vian informon por la listo de grupoj
aperonta en Jarlibro 1961.**

(vidu p. 406 k.s. en Jarlibro 1960)

LASTA MOMENTO

POR VARBI

Reklamojn

POR JARLIBRO 1961

Ni kalkulas je ĉies kunlaboro!

La nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton

32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7 Av. Léon-Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine) Francujo.

Administracio: 5 Bd. Stalingrad
Nice (A.M.)

POR LA DECEMBRAJ SOLENAĴOJ :

GRAVURBILDO DE ZAMENHOF,

21 × 27 cm de Reto Rossetti, (vidu
Dec. no. 1958) tre taŭga por klubejoj,
kunvenejoj ktp. 0,75 gld.; 3 steloj

FOTO DE ZAMENHOF,

poŝtkarto 0,20 gld.; 0,80 steloj.
Ĉion liveras la C.O. de U.E.A.

Ĉu interesas vin la folkloro de Nederlando ?

Aĉetu la ĉarmegan libreton

Sankta Nikolao en Nederlando

Bele ilustrita rakonto pri tiu granda festo de
la bonkora sanktulo.

Prezo : 1,50 gld., 6 steloj.

UNESCO COURIER

granda kultura revuo eldonata de
U.N.E.S.C.O.

**publikigis en sia numero de decembro
1959 grandan artikolon pri Zamenhof**

Tiu numero en **angla, franca, hispana aŭ
rusa** lingvo estas ricevebla ĉe la landaj
U.N.E.S.C.O.-instancoj **kaj ĉe U.E.A.**

Montrinda al ĉiuj neesperantistoj

Prezo : inkl. sendkoston : 0,50 gld; 2 steloj.

Mendante, indiku la deziratan lingvon !

* * *

Krome, riceveblaj ĉe U.E.A.

12 BELEGAJ FOTO-AFIŜOJ

kun Esperanto-teksto, pri la

HOMAJ RAJTOJ

Eldonis UNESKO Prezo : 4 int. resp. kuponoj aŭ
egalvaloro por la tuta serio.

Elektu por la Tago de la Libro!

MEMORLIBRO PRI LA ZAMENHOF-JARO

SVEDA ANTOLOGIO — ESPERANTA ANTOLOGIO — ĈINA ANTOLOGIO

DOKTORO ESPERANTO — VIRINO ĈE LA LANDLIMO —

NORMANDAJ RAKONTOJ — BRULANTA SEKRETO

SUB LA JUGO — RETORIKO — SONGE SUB POMARBO

SEP FRATOJ — HOMOJ KAJ RIVEROJ — QUO VADIS

PINTA KRAJONO — GÖSTA BERLING — MISTERO MINORA

KOKO KRIAS JAM — ŜTUPOJ SEN NOMO — REĜO EDIPO

BOFILINO — NEPALO — FERMENTARIO — VAGADO SUB PALMOJ

KANAKO EL KANANAM — TEMPESTO SUPER AKONKAGVO

KREDU MIN, SINJORINO — ORIGINALA VERKARO

PRIVILEGIA VOJO — SEKRETOJ DE LA MARESTAĴOJ

ABISMOJ — KATALUNA ANTOLOGIO — KIEN LA POEZIO?

KONTRALTE — LA ALIA PASINTECO — JOZEFO

PLENA GRAMATIKO — PLENA VORTARO — TERMINAROJ

HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO — LETEROJ DE ZAMENHOF

AMARA PANO — ROZOJ KAJ URTIKOJ — ARIEL

DEKKINGA FUĜAS — EL LA MANIKO — MEDALIONOJ

LA VIVO DE LA PLANTOJ — VOJAĜO AL KAZOHINIO —

TARTARIN DE TARASKONO — GRUK — LA BELA SUBTERA MONDO

ATAKOJ KONTRAŬ ĜARDENPLANTOJ — SALTEGO TRANS JARMILOJ

MIRU, PENSU, RIDU — MIKSPOTO — LA DEKTRIA MORTIS

INFANOJ EN TORENTA — LA TEMPOMAŝINO — PRO IŜTAR

PENSOJ DE ZAMENHOF — LA VERDA KORO — INFERIO

LA TAGLIBRO DE ANNE FRANK — TRI VERKOJ DE VOLTER

LA NEVENKEBLA ĜENO, — KARLO — MI SERĈIS ORON KAJ OLEON

Jen bunta titolaro el la libroservo de UEA. Krome, livereblaj ĉiuj titoloj troviĝantaj en la librolisto en la Jarlibro.

Ĉiu esperantisto aĉetu minimume unu libron en decembro!

Libroservo de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

